





Bulgaria ESPERANTISTO

V-19479/
43.1974

Kompl



1-2

1974

-ENHAVO

* * Por ankoraŭ pli fruktodona agado dum la jubilea jaro	1
* * Sciigo (pri ŝanĝoj en la Estraro de CK de BEA) . . .	2
* * Verda Tabulo	2
Andrej Rogov. Ĉilio	3
* * Ĉilio — la agantaj murdistoj	3
Nevena Nedelčeva. Kio estas lumo	4
* * За достойна среща (Обещание от Смолянски окръг) .	7
Boris Popov. Necerta paco	8
Vasil Mitovski. La esperantistoj de Trojan celebras 70-jaran jubileon	9
* * 70-jarojn Esperanto en Trojan kaj ĝia regiono (laŭ raporto de V. Mitovski)	10
* * La celebros de la 70-jara jubileo de Ivan Canev . . .	11
D-ro Stojan Moraresku. Ivan Ivanov Canev	12
Marin Băcev. La E-klubo de la instruistoj-esperantistoj en Sofio	14
* * Zamenhof-celebroj	14
* * En Pazarĝik propra E-klubo	14
* * Filatelistoj, unuigu vin!	15
* * El la vivo de MEM en Bulgario	15
Georgi Manev. Per Esperanto — en frata Ĉeĥoslovakio . .	15
* * Jubilea Literatura Konkurso	16
Paŭlina Nečeva. Esperanto-tagoj en Haskovo	16
Georgi Mihalkov. Vintva E-Semajno en Pamporovo . . .	17
Plamen Vačev. El la agado de „Anne Frank“	18
Leo Medvedev. Renkontiĝo de soveta E-junularo	19
Kristina Kaĝaja. Arbo de l'amikeco	19
Ida Lisičnik. Lasta vorto	20
Boris Kolker. Kantoj, kantoj . . . por vi, sciamaj	22
* * Vere internacia E-kurso en Budapeŝto	23
D-ro Arpad Máthé. Esperantisto — „doktoro de la teknikaj sciencoj“	24
Ludwig Schödl. El dokumentoj kaj memoroj pri la Labvrsta E-Movado	25
Ada. Antaŭjuĝoj	28
Prodan Prodanov. „Esperanto Keele Opik“	29
Ladislav Špina. Esperanto — lingvo de la paco	30
Ljuba Bojaĝieva. Fabeleto	31
Ergoto de Bonaero. Sur alia planedo	31
* * Krukvorteniĝmo. Tra la gazetaro. Deziras korespondi III, IV	

Sur la kovrilpaĝo :

1974 — jubilea kaj streĉa!

Momentoj el la konstruado de: nova kemia uzino en Devnja, atoma elektrocentraro en Kozloduj, elektrocentraroj en Sestrimo kaj Bobov Dol

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci 32, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205, Bucuresti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Švernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V—449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.

-V 19479/43.1974



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JANUARO-FEBRUARO

1974

1—2

JARO 43

POR ANKORAŬ PLI FRUKTODONA AGADO DUM LA JUBILEA JARO

La Plenkunsido de CK de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta je 17-a de decembro 1973 j., estas grava evento en la vivo de l'Asocio. Antaŭ la sojlo de la Nova Jaro — jubilea por nia renovigita prosperanta patrlando, dum la plenkunsido estis resumitaj la ĝisnunaj rezultoj en la plenumado de la decidoj de la 38-a asocia kongreso kaj starigitaj la novaj taskoj de la bulgara Esperanto-movado.

La Plenkunsido konstatis, ke BEA en sia tuteca agado sekvas decidojn de la Kongreso, kiuj trovis konkretan esprimon en la praktikaj iniciatoj de la programo, akceptita de la Oktobra Plenkunsido de CK de BEA en 1972 j. Konforme al tiu ĉi programo estas atingitaj gravaj sukcesoj en la organiza stabiliĝo de l'Asocio, en la variigo de ĝiaj iniciatoj kaj siaj manifestadoj.

La imponaj publikaj kunvenoj en la ĉefurbo kaj en Burgas (kun partopreno de oratoroj ankaŭ el aliaj landoj), dediĉitaj al la batalo por paco kaj al la Kongreso de la Pacamaj Fortoj en Moskvo, la entuziasma E-Recita de la Revolucia Poezio kaj Kanto en Târgoviște, la esperantistaj renkontiĝoj en Koprivštica kaj en Plovdiv (enkadre de la Internacia Foiro), la nacia konferenco de la lernantoj-esperantistoj en Haskovo, la aktiva partopreno de bulgaraj esperantistoj en la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, en kongresoj de IFEF, en la Moskva forumo de pacamaj fortoj, en la konferencoj de la pedagogoj en Maribor, — jen nur kelkaj el la faktoj, kiuj markas la dinamikan agadon de la bulgaraj esperantistoj enlande kaj sur la internacia areno dum la lasta jaro!

Notinda sukceso estis atingita en la politika-eduka laboro. Tiurilate tre utilaj montriĝis la referaĵoj, farataj laŭ temara plano kaj dissendataj al ĉi asociaj organizaj unuoj. Amasa estis la partopreno de la esperantistoj en celebroidoj de diversaj datrevenoj — la 50-a jubileo de USSR, la 90-datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, la 50-jariĝo de la Septembra Ribelo, la 30-a jubileo de la Patrolanda Fronto k. a.

Apartan atenton la Plenkunsido dediĉis al la internacia korespondado. Ĝi alvokas ĉiujn bulgarajn esperantistojn entrepreni ankoraŭ pli vastan individuan kaj kolektivan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. Tio estas specifa kanalo de nia internacia agado por popularigi la sukcesojn de nova Bulgario kaj ĝian kontribuon por firmiĝo de la paco kaj la sekureco en la mondo.

La partoprenantoj en la Plenkunsido de CK pridiskutis ankaŭ la staton



le la asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Oni faris rekomendojn por decida likvido de la granda malfruiĝo de la gazeto, same por plibonigo de ĝia nhavo.

La Plenkunsido unuanime akceptis planon de iniciatoj por celebrego de la 30-a jubileo de la Socialisma Revolucio en nia lando de 1944 j. La lenumo de tiu plano estos nia, esperantista, kontribuo por inda renkonto de la historia kaj hela tago de la libero — la Naŭa de Septembro.

Per la akceptitaj protestaj telegramoj lige kun la agreso de Israelo en la Proksima Oriento kaj kun la sangaj eventoj en Ĉilio la bulgaraj esperantistoj denove esprimis sian fratan solidarecon kun la popoloj batalantaj por la rajtoj kaj liberecoj.

Al obstina laboro kaj batalo por novaj sukcesoj de la bulgara Esperanto-movado, por glorigo de pacama socialisma Bulgario!

Sciigo

Rilate al la organizaj demandoj la Plenkunsido de 17. XII. 1973 decidis:

1. Liberigas k-don Nikolaj Pârvanov el lia posteno de membro de la Eŝtaro de CK de BEA — pro lia peto.

2. Liberigas k-dinon Bojka Batalska el la posteno de sekretario de CK de BEA — pro ŝia daŭra estado en eksterlando.

3. Elektas kiel membron de la Estraro de CK de BEA inĝ. Angel Todorov.

4. Elektas kiel membron de la Estraro de CK de BEA inĝ. Petr Todorov.

VERDA TABULO

Malgraŭ la tre malfavoraj cirkonstancoj, nome, la malfruiĝo de „Bulgara Esperantisto“, multloke niaj aktivuloj plenumis inde sian Esperanto-devonon kaj por 1974 varbis rekordan nombron de abonantoj. Jen kelkaj precizaj informoj:

Individuaj aktivuloj

Dimitr Ivanov el u. Plovdiv — kolektis 140 abonojn.

Ivan Stranski el u. Pazarĝik — kolektis 106 abonojn.

Kolektivaj aktivuloj

Esperanto-Societo „Fajrero“ en v. Dospat, distrikto de Smoljan, kun gvidanto Emil Ĉirpanski, instruisto — kolektis 126 abonojn.

Lernanta Esperanto-Societo „Anne Frank“ en la Teksa Teknikumo en u. Vraca kun gvidanto Enjo Daskalov, instruisto — kolektis 125 abonojn. Dankon al ili!

En la sekvaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“ ni publikigos ankaŭ la nomojn de aliaj aktivuloj. Ni petas, informu nin oficiale pri bonaj sukcesoj.

La Redakcio



ĈILIO (Libero aŭ morto) de Andrej Rogov

Ĉili' — kia mallonga vorto!
Ĉili' — kia terura sorto!

Via nomo sonas legende,
Salvatore Allende¹.

Mi vin vidas: en sango la vesto,
je la pordo frapas la besto —
monstra, glita, malseka, ronda,
kiel la korpo anakonda².

Avide faŭkas la buŝo besta,
sed vi estas kun koro honesta:

„Mi ne vivos, prefere mi mortos,
sed neniam la jugon mi portos!

Tiel mortis heroe, honeste
Federico,³ ankaŭ Ernesto,⁴

kaj Lumumba,⁵ kaj Ĉe Gevara⁶. . .
Lastan kison, Hortenzia⁷ kara! . . .

Mortos mi kun armilo en mano.
Savu vin, zorgu pri la infanoj!

Mi brakumu vin, Beatrico⁸,
filineto amata, min kisu. . .

Kredas mi: la patrujo leviĝos.
Mia popolo liberiĝos!

Al batalo, popolo granda!
Nun leviĝos amaso giganta:

El Puerto-Natales⁹ — ŝafistoj,
el Pajpoto¹⁰ — la bravaj kupristoj.

Unuĝos ĉiuj en rondon,
kaj strangolos la anakondon. . .
Ĉilio — mia lando lumsorta. . .“

Tiel falis Allende senmorta.

¹ Salvatore Allende (elparolu Aljende) — prezidento de Ĉilio, murdita de la oficira hunto.

² Anakondo — serpentego. Ĉiu memoras la politikajn karikaturojn en la ĉilia gazetaro: anakondo ĉirkaŭvolvas la svelte mallarĝan talion de Ĉilio — aludo pri „Anaconda Copper“ — usona kompanio, sklaviginta la landon.

³ Federico Garcia Lorca (elparolu Federiko Garsia Lorka) — lirika hispana poeto, mortpafita de la hispanaj faŝistoj.

⁴ Ernst Thälmann (elp. Telman) — gvidanto de la germanaj komunistoj, pereigita de hit-

leranoj en koncentrejo.

⁵ Patrice Lumumba (elp. Patris Lumumba) — nacia heroe de Afriko, mortigita de reakciuloj.

⁶ Ĉe Gevara — legenda heroe de la gerila liberiga lukto de latinamerikaj popoloj.

⁷ Hortenzia Bussi de Allende — edzino de la ĉilia prezidento Salvatore Allende.

⁸ Beatrice de Allende — la plej aĝa filino de S. Allende.

⁹ Puerto-Natales — norda regiono de Ĉilio, centro de brutbredado.

¹⁰ Pajpoto — centro de kupra industrio en Ĉilio.

ĈILIO — LA AGANTAJ MURDISTOJ

Dum la regado de la Pariza Komunismo nur du perfidintaj generaloj estis pafmortigitaj, sed la „sanga semajno“, frukto de la versajlaj reakciuloj, mortigis pli da francoj ol dum la tuta teroro. La Oktobra Revolucio, la sturma preno de la Vintra Palaco, kaŭzis la morton de dekduo da homoj, sed la civila milito, eksplodigita de blankaj generaloj kun la financa kaj milita helpo de 14 kapitalismaj ŝtatoj, pereigis milionojn da rusoj. La naskiĝo

de la hispana Respubliko kaŭzis eĉ ne unu vunditon, sed la ribelo de unu generalo, helpata de faŝismaj ŝtatoj, rezultigis 1 milionon da mortintoj. En Indonezio la diktaturo venkis sur la kadavroj de 1 miliono da veraj aŭ supozataj komunistoj. La marionetoj de Sajgono dividas kun siaj mastroj la abomenan respondecon de la neimageblaj suferoj truditaj al la vjetnama popolo.

Kaj nun, kiom da ĉilianoj jam pereis pro la volo de la usona imperiismo,

de ĝiaj ĉiliaj generaloj-lakeoj, por forĉasi registaron laŭleĝe elektitan?

Ĉiam la samaj masakras la samajn! Kaj ĉiam por defendi la plej malnoblajn privilegiojn! Iliaj samklasanoj ĉie en la mondo apenaŭ povas kaŝi sian ĝojon, sian senhontecon, post la puĉo de Santjago kaj la morto de la prezidento Salvador Allende. Kaj la kurzo de la kupro, kiu malaltigis post la naciigo de la ĉiliaj kuprominejoj, por puni la ĉilian popolon, subite realtigis post la puĉo, por rekompenci la murdistojn. La krimo estas tiel klare subskribita.

La privilegiuloj de la fortune ne povis toleri maldekstran registaron, kiu batalis por la malriĉuloj, kontraŭ la koaliciitaj fortoj de la mono, kontraŭ la sinjoroj de l'kupro, kontraŭ la imperio de ITT, kontraŭ CIA. Kaj ili preferis aldoni novan krimon al la montaro de krimoj, kiun iliaj samuloj faris dum la jarcentoj.

Sed la mondo ŝanĝiĝis, la puĉistoj

devas alfronti la neatenditan reziston de la ĉilia popolo, en la tuta mondo levigas ondego da protestoj probable senprecedenca. La politiko de Salvador Allende kaj de lia registaro trudis respekton al multegaj homoj eĉ en konservativaj rondoj. La sang-elverŝo fare de ĉiliaj puĉistoj tuj post la fimi-lito en Hindoĉinio montras la respon-decon de la usona imperiismo, donas novan frapon al la usona prestiĝo. La teoriuloj de la „superpotencoj“ povas babili, ili ne povas ŝanĝi la pli kaj pli evidentan fakton, ke la frapoj kontraŭ la malriĉuloj, kontraŭ demokratio, kontraŭ paco ĉiam venas de la sama flanko: tiu de kapitalo. Se ni volas efike batali por paco, ni ne rajtas forgesi ĉi tiun fundamentan veron.

Sed la faŝistoj gajnis nur unu batalon, ili neniam gajnos sian militon kontraŭ la popoloj. La tuta mondo viglas,

*El „Paco“ — organo de MEM,
komuna skandinavia n-ro 6/1973*

KIO ESTAS LUMO?

de Nevena Nedelčeva

— Ĉu vi volas transpasi la straton? — aŭdis Stefano nekonatan voĉon de junulino.

— Jes, — li respondis, — mi atendas, ke finiĝu la bruo de aŭtomobiloj, tramoj. . .

— Ĉu vi permesus al mi gvidi vin ĝis la kontraŭa angulo?

— Bone, — li konsentis.

La voĉo estis sincera, muzika. La mano, kiu prenis la lian, estis iom malvarma, sed tre agrabla.

— Mi dankas vin, — diris Stefano, kiam ili transpasis la straton.

— Ne dankinde, — respondis ŝi, — mi ĝojas, ke mi povis iomete helpi vin.

— Ĉu vi ĉiam ĝojas, kiam vi helpas iun? — Li volis reteni ankoraŭ kelkajn momentojn la nekonatinon.

— Jes, kaj nun speciale pri vi, ĉar

mi havis blindan fraton. Bedaŭrinde, ni perdis lin antaŭ unu jaro.

— Eble li ne estis naskita blinda?

— Jes. Li blindiĝis, kiam li estis soldato — pro eksplodo. Tio estis antaŭlonge. Mi estis tiam dekjara.

— Kaj vi kreskis granda, . . Eble nun vi estas gimnazianino.

— Kiel vi komprenis tion?

— Nu, laŭ via voĉo.

— Vere, vere. Ankaŭ mia frato per la voĉo konis la homojn.

— Tamen li . . . li estis vidinta la lumon, — profunde sopiris Stefano.

— Jes, la lumon li vidis kaj eble pro tio li suferis pli multe. . . Sed ni ne pensu pri tio. Doloras paroli. . .

— Jes, vi pravus. Sed tiam pri kio ni povus paroli?

— Pri bonaj kaj gajaj aferoj. Mi ege ŝatas la gajecon. Kien vi iras?



— Mi iras tagmangi. Kaj vi?
— Hejmen. Agrablan apetiton.
— Mi bondeziras al vi esti ĉiam gaja.

— Tutkoran dankon al vi. Ĝis revido!
— Ĝis revido, — li respondis, aŭskultante siajn rapidajn paŝojn.

La sekvan tagon ia neklara sento kondukis lin al la loko, kie li aŭdis la agrablan voĉon de la junulino. Kaj je la sama horo. Ĉu li esperis denove renkonti ŝin?

— La voĉo, — pensis Stefano, — kiel grava estas la voĉo!

La sennombraj nuancoj de la voĉoj, de la sonoj, de la bruoj estis la mondo, en kiu li vivis.

Ĉio agrabla estis ligita kun bela, milda, karesema voĉo. La malagrableco kaj la timo estis esprimitaj per terura bruego.

En sia infanaĝo li time premis la patrinan manon, kiam la bruo de tramo proksimiĝis.

Pasis horoj, pasis tagoj, sed la atendatan voĉon li ne aŭdis. Kial li pensis pri ŝi? Eble li neniam plu renkontos ŝin?

Foje tamen, neatendite, en tute alia strato, li aŭdis ŝian voĉon.

Io ektemis en lia brusto. Li haltis.

— Mi ĝojas, ke mi renkontas vin, — ŝi ekparolis.

— Ankaŭ mi ĝojas aŭdi vian sinceran voĉon, — li respondis. — Ĉu mi povas demandi vin, kien vi iras?

— Jes. Mi devas aĉeti produktojn kaj reveni hejmen. Sed ni povas marŝi iomete kune. Tio memorigos al mi la promenadojn kun mia frato.

— Certe li estis feliĉa esti kun vi.

— Eble. . . Mi ege amis lin, kaj ankaŭ li amis min. Kiam mi estis malgranda, li portis min en siaj brakoj. Reveninte de la lernejo, kiam mi vidis lin, mi estis freneza pro ĝojo kaj kuris por renkonti lin.

— Mi envias lin.

— Pro kio do? — ŝi miris.

— Ĉar li povis aŭdi vian voĉon ĉiutage.

Ŝi haltis kaj diris:

— Mi bedaŭras, se mi ne povas renkonti vin pli ofte. Mi estas tre okupata. Mia patrino ne estas tute sana kaj mi devas prizorgi la mastrumadon. Krome, mi devas viziti la lernejon. Kaj plie, mi ludas pianon. Tio estas la deziro de mia patro. Li estas muzikisto kaj volas, ke mi nepre estiĝu pianistino. Sed, bedaŭrinde, verŝajne lia deziro ne realiĝos. Mi ne posedas grandan talenton kaj preferas fariĝi kuracistino. Kaj finfine, mi lernas Esperanton.

— Vi lernas Esperanton? — li ekĝojis. — Ankaŭ mi lernis tiun ĉi lingvon antaŭ kvin jaroj, kun mia patrino, kiam ŝi estis viva.

— Vi ne havas patrinon?

— Jes. Ankaŭ patron mi ne havas.

— Kun kiu vi vivas?

— Sola.

— Sola?!

— Jes. Ofte venas al mi mia avino, kiu loĝas proksime kune kun la familio de mia onklo.

La junulino fermis siajn okulojn kaj kiam ŝi malfermis ilin, larmoj ekbrilis, sed li aŭdis nur ŝian voĉon.

— Bone, bonege! Ĉu vi havas telefonon? — ŝi demandis.

— Jes.

— De tempo al tempo, vespere, mi povus aŭdigi min al vi.

— Vi estas tre afabla. Do, mi atendos vian agrablan voĉon.

— Pri kio vi okupas vian tempon?

— Mi laboras en la kooperativo de blinduloj kaj ludas violonon en ilia orkestro.

— Ha, tio estas tre bona. Sed nun — ĝis revido!

— Ĉu mi povus scii vian nomon?

— Dejana.

— Dejano? Belega nomo! Ĝi sonas kiel muziko. Pardonu min, ke eble mi retenis vin tro longe.

— Ne, ne. Mi sukcesos aĉeti ĉion kaj rapide revenos hejmen.

Denove trenis sin tagoj, vesperoj, semajnoj. Sed ŝia voĉo ne venis per la te-

lefono. Doloro plenigis lian koron. Kial? Ĉu la amo sin montras per ĝi? Li vane atendis ĉe la telefono ĝis nokto-mezo. Kaj jen — fine eksonis ŝia voĉo. Jes, ŝia voĉo! Liaj lipoj ekridetas. Io skuis lian animon. Lia koro, lia tuta estaĵo plenigis de senfina ĝojo. Ne, ne nur ĝojo, ia nekonata profunda sento, kiel melodio, plenigis lian animon.

Ŝia gaja voĉo. . . Ŝi rakontis, ke antaŭ semajnoj iris sur la monton, sed falis kaj rompis la kruron.

— Ĉu vi ankoraŭ havas doloron? — zorgoplene demandis Stefano.

— Jes, doloras. Sed tio ne gravas. Tri semajnoj mi restis en malsanulejo. Nun mi devas resti hejme, eble ankoraŭ du aŭ tri monatojn.

— Mi multe, multe bedaŭras.

— Kial?

— Nu, kompreneble, ĉar vi suferas. . . Kaj krome vi ne povas iri al lernejo. En kiu klaso vi estas?

— En la lasta. Tamen mi lernas hejme. Poste mi faros ekzamenon. . . Kial vi eksopiris?

— Ĉu vi aŭdis mian sopiron? . . . Kaj nun mi ne renkontos vin eĉ hazarde sur la strato.

— Sed vi povas malfrue vespere aŭdigi vin al mi per la telefono.

— Ĉu?

— Nature. . . Vi diris al mi, ke antaŭ kvin jaroj vi lernis Esperanton. Ĉu vi nun okupiĝas ankoraŭ pri ĝi?

— Jes. Tamen mi ne povas okupi min sufiĉe, ĉar ne estas multa literaturo por blinduloj. Aliajn Esperantogazetojn kaj revuojn mi, kompreneble, ne povas profiti.

— Ĉu vi volas, ke mi legu per telefono al vi miajn Esperantajn lecionojn, aŭ . . . iun alian legaĵon?

— Ho, kompreneble. Tio estus ege agrabla por mi.

— Tiamaniere ankoraŭ mi povos pli rapide lerni la lingvon. Mi do havos motivojn danki al vi.

Subite la telefono ĉesis. Versajne la

telefonistino ĉesigis la longan interparoladon.

— Dio mia, — li pensis, — ŝi dankos al mi! Kia bona animo!

De tiam ĝis malfrua vespero li atendis ĉe la telefono. Dejana estis ĉiam gaja. Ŝi legis kiel infano iun el siaj lecionoj kaj poste Esperantan rakonton.

Foje ŝi diris al li:

— Hodiaŭ ĉe ni estas festo.

— Festo? Kia festo?

— Naskiĝtago de mia frato. Se li estus viva, li aĝus tridek jarojn.

— Tridek? Ankaŭ mi havas la saman aĝon.

— Tiel ankaŭ mi supozis. Kaj pro tiu festo mi legos al vi kelkajn memoraĵojn el mia infaneco ligitajn kun mia frato. Mi skribis ilin eĉ en Esperanto! Kaj mi penis, ke ili estu plenaj de ĝojo, suno, lumo. . .

— Lumo? Diru al mi kio estas lumo?

— Lumo? Lumo estas amo.

— Amo? Ĉu vere?

— Tute vere. En la amo, kiel en la lumo, la homoj interkompreniĝas plej bone. — Strange! Sed diru tiam, kio estas amo?

— Ĝojo, — respondis Dejana, — granda, senfina ĝojo.

— Ĉu nur tio? Ĉu ne estas la plej bela muziko, plej tenera bonodoro, kaj ankaŭ ia profunda, neesprimebla sento, kiu plenigas la tutan homan estaĵon kaj igas ĝin feliĉa kaj bona.

— Certe! Kaj dum vi aŭskultas la memoraĵojn, mi volus, ke vi estu tiel ĝoja kaj gaja, kiel mia frato antaŭ dek jaroj.

— Mi estas ĉiam gaja, kiam mi aŭskultas vin. Via gajeco trapasas la telefonon kaj plenigas min dum tuta tago.

— Sed tiel mi estas feliĉa. Do, aŭskultu.

Kaj ŝi komencis per plej senzorga kaj gaja voĉo legi la memoraĵojn pri la sunaj kaj ĝojplenaj iamaj tagoj, malgraŭ ke sur ŝiaj vangoj ruliĝis larmoj.



ЗА ДОСТОЙНА СРЕЩА

Ние, участниците в Петия разширен пленум на Окръжния комитет на Българския есперантски съюз в гр. Смолян, състоял се на 6 февруари 1974 г. в Пампорово, в отговор на Обръщението на ЦК на БКП, Министерския съвет и ЦС на Българските професионални съюзи за достойна среща на Националната конференция и Тридесетата годишнина на социалистическата революция в България,

ОБЕЩАВАМЕ:

1. Да бъдем в първите редици на всенародната борба за претворяване в живо дело на партийната повеля „1974 — година на ударен труд за изпълнение на Шестата петилетка“.

2. Да разширим и подобрим значително пропагандирането на социалистическите завоевания в обновената ни Родина далеч зад пределите на страната чрез международното кореспондиране, организирани от нас международни есперантски прояви и специално издаваните агитационни материали.

3. На младежката национална есперантска пролетна среща в Казанлък окръжната ни организация да се представи с цялостна, разнообразна, на високо художествено и идейно равнище програма, посветена на Националния партийен форум и 30-годишния юбилей на свободата.

4. Международните есперантски прояви в Пампорово и Писаница — зимната седмица, курсовете и лету-

ването, да организираме и проведем на по-добро ниво.

5. Да разширим и подобрим работата по разменните гостувания с чуждестранни есперантски групи особено от социалистическите страни и да проведем вечер на българо-съветската дружба.

6. Всички курсове, кръжоци и групи за факултативно изучаване на международния език в окръга, утвърдени от Четвъртия пленум на ОК на БЕС, да завършат успешно.

7. Всеки организиран есперантист от окръга да бъде привлечен за абонат на съюзния орган „Български есперантист“ до 1 март 1974 г.

8. Членският внос да съберем до 31 март 1974, като в същия срок се отчетем пред ЦК на БЕС.

9. Още по-добре да използваме окръжния вестник, местните многотиражни, радиоуредби и др. за пропагандиране на есперанто.

10. Членовете на Българската есперантска кооперация — материалната база на есперантското движение у нас, да увеличим на 120 души с дялов капитал над 10 000 лева.

НИЕ ПРИЗОВАВАМЕ:

1. Всички български есперантисти на ударна работа за предсрочно изпълнение на Шестата петилетка, за достоен отклик на партийната повеля.

2. Ръководствата на есперантските

Tute neatendite ŝia voĉo interrompigis.

— Dejana! — vane li vokis ŝin — Dejana!

Silento. Nenia respondo.

Ŝi estis fermita la telefonon, por

ke li ne aŭdu, ke ŝi ploras, ploras forte nereteneble.

Ŝi ne volis, ke li sciu tion. Ja ŝi deziris doni al li nur ĝojon, nur ĝojon. . Kiel iam al ŝia amata frato ŝi penis doni ĉiam nur ĝojon.

ужества и окръжните комитети на ИС в страната да положат максимални усилия за значително увеличаване броя на организирани есперантисти и тяхното предсрочно читане с членския внос, абонатите „Български есперантист“, членове на Българската есперантска операция и вноските за дялов капитал, международното кореспонденране, успешно завършване работата на курсовете, кръжоците и групите за факултативно изучаване на

есперанто, масово и с добре подготвени програми да се явим на националната есперантска среща в Казанлък и др.

Само така ще можем с открито чело, достойно да посрещнем Националната партийна конференция и Тридесетата годишнина на социалистическата революция в България — за обща наша радост и законна гордост, за пример на есперантистите от другите страни.

NECERTA PACO

La unua jaro post la subskribo de riza Interkonsento pri pafĉesigo de paco en Vjetnamio finigis per iuj ngeraj vidaĵoj. La senĉesa plifortigo la streĉeco en Sajgono kaj aliaj andaj sudvjetnamaj urboj, la miloj provokaj agoj kaj malkaŝitaj perar-laj bataloj, la atencoj kontraŭ la erkonsento daŭras.

Unu jaron post la kondiĉita dato la fĉesigo ankoraŭ ne estas realaĵo en dvjetnamio. Tio estas ekstreme grava uacio minacanta rekte la pacon en lando. Estas klare por ĉiu, ke en da Vjetnamio vera paco ankoraŭ ne estas establita. La kaŝita milito tie ŝre ekzistas, kaj eĉ estas reala ngero pri tria milito en Vjetnamio.

de longe atendata paco estiĝas ĉiam necerta. Sur la politika horizonto Vjetnamio densiĝas fulmotondraj boj.

Kial tiom malrapide kaj per tiom ilte da sango faras al si vojon la co en Vjetnamio? La sciigoj klare ontras, ke dum la 10 monatoj post pafĉesigo, la armistico estis rompita ol 300 000 fojojn. Pli ol 50 000 moj pagis per sia vivo tiujn rompojn la armistico. La sajgona reĝimo as ĉion eblan por detruai la Inter-nsenton kaj atingi siajn kontraŭ-polajn celojn. Kontraŭpopolaj, ĉar Interkonsento antaŭvidas la kreon de icia Konsilantaro por nacia paciĝo,

kiu devas pretigi vicon da politikaj aktoj, inkluzive liberajn balotojn, per kiuj la popolo de Suda Vjetnamio voĉdonos kaj decidos, kia estu ĝia morgaŭa tago. Anstataŭ tio la memproklaminta sin sajgona gvidanto deklaras, ke en Suda Vjetnamio „estos nek paco, nek komunaj balotoj“. Eĉ kelkajn tagojn antaŭ la jariĝo de la subskribo de l'Interkonsento li diris: „... ni ne permesos, ke la komunistoj sentu sin certaj en la regionoj, kiuj provizore troviĝas sub ilia kontrolo“. Kion signifas tio? Kial Thieu minacas renovigi la militon kun ĉiuj konsekvencoj kaj teruroj? La radiko ne estas nur en la kontraŭpopola esenco de la sajgona kliko. Oni devas serĉi ĝin pli malproksime de la palaco de Nguyen Van Thieu. En Suda Vjetnamio laboras pli ol 24 000 militkonsultantoj, alvenintaj el Usono, 3 500 de ili estas en la sajgona ministerio de la milito. Ilia agado malhelpas la restarigon de la paco. Tion vidas la tuta homaro. La progresemaĵ fortoj rajte starigas la demandon: pro kio oni ne liberigas la arestitojn de la sajgona reĝimo pro politikaj kaŭzoj — pli ol 200 000 personojn? Kial do oni ne restarigas la demokratiajn rajtojn de la popolo en la regionoj kontrolataj de la sajgona administracio? Kial la traktado de la politika estonteco de Suda Vjetnamio paŝas sur unu kaj sama loko? La



streĉiteco subtenata per interrompaj malobeoj al la Interkonsento, per aventuraj klopodoj por depreni partojn de la liberaj teritorioj, la subpremataj rajtoj de la civitanoj, la malkaŝaj minacoj per renovigo de la aerbombardado, la plano liveri novajn armilojn je sumo de pli ol unu miliardo da dolaroj — jen la paŝoj de Sajgono, kiuj plidensigas la fulmotondrajn nubojn kaj faras necerta la pacon en Vjetnamio.

La progresema homaro vigle observas tiun dangeran procezon kaj insistas pri strikta plenumo de la Pariza Interkonsento. En tiu rilato ĉiuj pacamaj fortoj en la mondo estas plene solidaraj kun la vjetnama popolo.

ORGANIZA VIVO

LA ESPERANTISTOJ DE TROJAN CELEBRAS 70-JARAN JUBILEON

La 24-an de novembro 1973 la esperantistoj de Trojano kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj celebris duoblan jubileon: 70 jarojn de la fando de la unua E-Societo „Amikaro“ (je la 15 de junio 1903) kaj 50 jarojn de la fando de l' hodiaŭa E-societo „Balkana Stelo“ (novembro 1923) en Trojano.

La luksa halo por kunsidoj kaj la vastaj salonoj en la konstruaĵo de la Urba Popola Soveto, disponigitaj al la esperantistoj, estis feste ornamitaj. Ĉeestis ĉirkaŭ 250 esperantistoj el la urbo kaj el aliaj loĝlokoj kaj multaj neesperantistoj.

La prezidanto de la Societo d-ro Paĉev malfermis la solenaĵon kaj bonvenigis la gastojn.

Raporton „70 jarojn Esperanto en Trojano“ faris Vasil Mitovski, kiu atente, per abundaj materialoj priskribis la disvoligon de la E-movado en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj per faktoj klarigis ĝian progreseman karakteron. Ĉio ĉi pravas, ke la E-societo en Trojano staras en la unuaj vicoj de la E-movado en nia lando.

Grupo da lernantinoj el la loka gimnazio, sub la gvido de k-dino Ikonopisova, prezentis belartan programon en Esperanto. Junpioniroj de lernejo „Ivan Haĝijski“ sub la gvido de k-dino Zlateŝka salutis la ĉeestantojn kaj prezentis freŝajn diantojn al la prezidantaro.

Salutojn kaj bondezirojn al la Societo-jubileo prezentis Bojidar Leonov — en la nomo

La esperantistoj ankaŭ ne devas koni paŭzojn en la batalo por paco. Ni ĉiuj devas esti atentemaj kaj agemaj, por ke la vjetnama popolo — de Nordo kaj de Sudo — ekvivu libere kaj sendepende en sia patrolando. La vjetnama popolo ne permesos, ke oni deprenu tion, kion ĝi akiris post pli ol dekjara terura milito. Estas nature, ke la Provizora Revolucia Registaro de la liberigitaj teritorioj de Suda Vjetnamio kaj la demokratiaj fortoj en la kontrolataj de Sajgono teritorioj donos decidan reziston al la provokoj kaj daŭrigos seninterrompe ĝis plena venko la batalon por justa kaj certa paco.

Boris Popov

de CK de BEA, Coŝo Kolarov — en la nomo de la DK de BEA en Loveĉ, reprezentantoj de E-societoj en Varna, Karlovo, Loveĉ, v. Borima. Estis ricevita saluttelegramoj de la esperantistoj el Polski Trámbeŝ, Gabrovo, Ŝumen, Plovdiv k. a.

K-do Leonov anoncis, ke ligo kun la duobla jubileo CK de BEA honorigas la E-aktivulojn de Trojano per jubileaj insignoj — 13 oraj kaj 6 argentaj.

La solenaĵo daŭris ĝis malfrua horo per dancoj kaj kantoj.

Vasil Mitovski

V. Mitovski raportas



La situo de urbo Trojano en la piedoj de la Balkan-montaro kaj ĝia klimato delonge difinis la ĉefajn manierojn de la loĝantaro gajni vivrimedojn — tio estis la brutbredado, frukto-kulturado, lignoprilaborado, potfarado k. s. kaj vendado de tiaspecaj produktoj en proksimaj kaj malproksimaj lokoj en la ebenaĵoj. Trojanoj multe veturis tra la lando, vizitadis foirojn, renkontigis kun multaj homoj, vidis diversajn vivmanierojn. Tre viglaj, inventemaj kaj liberemaj pro la malfacilaj vivkondiĉoj en sia montara regiono, ili facile akceptadis novajn politikajn kaj kulturajn ideojn, vastigis sian spiritan horizonton. Tial dum la otomana jugo multaj trojanoj partoprenis aktive la naciliberan batalon kaj post la liberigo frue akceptis ankaŭ la ideojn de la socialismo. Ankaŭ la internacia lingvo Esperanto frue trovis adeptojn ĉi tie. Jam en la komenco de la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento la instruisto Coĉo Stojanov Terzijski, membro de la Unuiĝo de Instruistoj-Socialistoj, ellernis aŭtodidakte la lingvon kaj komencis disvastigi ĝin. Li havis riĉan E-bibliotekon, korespondis kun esperantistoj el Francio, Germanio, Argentino kaj.

Alia apostolo de Esperanto en tiu tempo estas Penko Stoev, bankoficisto, kiu farigis esperantisto en 1901. Kune kun li ellernis Esperanton la instruisto Vasil Boĝakov. En la aŭtuno de 1902 ambaŭ pioniroj malfermis E-kurson, kiun vizitis 43 diversaj kaj diversprofesiaj civitanoj.

El ĉiuj, kiuj sukcese finis la kurson, kaj el civitanoj, kiuj memstare lernis la lingvon, je la 15 de junio 1903 estis fondita la unua E-Societo en Trojano — „Amikaro“, kies prezidanto farigis Vasil Boĝakov kaj sekretario — Penko Stoev. Tiel estis metita la komenco de organizita E-movado en la urbo. Jen la konsisto de la membraro de „Amikaro“, unu el la 12 ekzistantaj en tiu jaro E-societoj, kluboj kaj grupoj en nia lando (laŭ Jarlibro, eĉdonita en 1904 j. en Parizo): 13 instruistoj, 9 oficistoj, 4 komercistoj kaj 11 metiistoj — entute 37 membroj. Ĉiuj societanoj abonis la monatan revuon „Rondiranto“, eldonata tiam en Plovdiv, kelkaj abonis ankaŭ „Internacian Sciencan Revuon“, en kiu estis multaj adresoj de dezirantoj korespondi. Komenciĝis vigla E-korespondado, kiu grave helpis la membrojn perfektigadi siajn lingvo-konojn, ĉar la E-literaturo en tiu tempo estis tre malriĉa. La membroj de la Societo zorge atentis la regolon — kiam esperantistoj renkontiĝas, ili parolu nur en Esperanto. Tiamaniere ili faris bonan propagandon inter la civitanoj. Aparte grave kreskis la aŭtoritato de la nova movado en la urbo, kiam Penko Stoev vizitis la VII-an UK de Esperanto en Antverpeno (Belgujo), kie li

estis oficiala kaj sola reprezentanto de Bulgario. Stoev persone konatigis kun d-ro Zamenhof.

Forte imperesis la civitanojn ankaŭ la vojaĝo de Miĉo K. Canov al Italio, kie li pasigis tutan monaton kaj estis bonege akceptita kaj helpita de la italaj esperantistoj en siaj komercaj laboroj. Tio montris la praktikan utilon de Esperanto kaj ŝtopis la buŝojn de multaj skeptikuloj, kiuj asertis, ke Esperanto estas morta lingvo, kiun neniu uzas.

Dum la periodoj de la militoj — Balkana (1912), Interaliancana (1913) kaj Unua Monda (1914—1918) „Amikaro“ forvelkis kaj estingigis. Tamen ankaŭ dum tiuj pezaj jaroj iuj trojanoj memstare lernis la lingvon kaj farigis esperantistoj. Ekzemple, Minko Miĉev Conkovski sola ellernis Esperanton en 1912 kaj por ĉiam farigis unu el la pilastroj de Esperanto en Trojano. Li kreis multajn esperantistojn kaj ankaŭ nun aktive laboras en la E-societo malgraŭ sia aĝo.

En 1912 ellernis Esperanton Mirĉo Vasilev el v. Leŝnica. Post la militoj, jam juristo, li ekgvidis E-kursojn, organizis la junularon, energie disvastigis Esperanton.

Fine de la militperiodo esperantisto farigis ankaŭ Minko Topalov (la Grafo), kiu malgraŭ sia elementa instruiteco ellernis bonege la lingvon kaj larĝe uzis ĝin por praktikaj celoj. Per sia abnegacia kaj rezultodona E-agado li estis modelo por ĉiuj.

Dum la militperiodo Esperanton ellernis ankaŭ Nikola Minkov Nikolov, poste gimnazia instruisto, kiu gvidis multajn E-kursojn, Dimitr Penĉev Stanev, Tonĉo Conevski, Angel Majdurov k. a.

Post la Unua Mondmilito, dum la regado de Bulgara Agrara Popola Unuiĝo, kreiĝis tre favoraj kondiĉoj por disvastigo de Esperanto. La ministro de la Popola Instruado Stojan Omarĉevski enkondukis instruadon de Esperanto en la realajn mezlernejojn konekse kun la nova Legō por la Popola Instruado.

En 1923 j. Minko Topalov (la Grafo) kaj Tonĉo Conevski partoprenis la XV-an UK de Esperanto en Nurenbergo — la plej grandan en la historio de Esperanto (4963 partoprenintoj el 43 landoj) kaj revenis de tie ankoraŭ pli entuziasmitaj pri Esperanto.

Sed post la faŝista puĉo je la 9-a de junio 1923 ĉe ni, en la cirkonstancoj de kruela monarko-faŝista reĝimo, ekestis tre malbonaj kondiĉoj por Esperanto.

Dum la nokto de 22—23-a de septembro 1923 kelkaj esperantistoj — Minko Conkovski, Ivan Miĉev Conkovski, Minko Topalov (la Grafo), Mirĉo Vasilev k. a. kun armiloj en la manoj atendis la signalon por ribelo.

Malgraŭ ĉio en la aŭtuno de 1923 la pro-



gresemaj esperantistoj de Trojan decidis fondi E-societon. Ili utiligis lecionon de la nova E-kurso, gvidata de Mirčo Vasilev, alvokis ankaŭ kelkajn malnovajn esperantistojn kaj en novembro la societo estis fondita. Ĝi ricevis la nomon „Junulara Esperanto-Societo „Balkana Stelo“ — Trojan. Kiel prezidanto estis elektita Minko Topalov. Iom post iom la Societo sukcesis organizi en siaj vicoj ĉiujn esperantistojn kaj komencis aktivan agadon. En 1926 j. la vorto „Junulara“ en la nomo de la societo defalis kaj ĝi fariĝis E-Societo „Balkana Stelo“, kia ĝi restis ĝis nun.

Ĉe pezaj kondiĉoj laboris „Balkana Stelo“. La kunvenoj kaj la kursoj okazis tre malfrue — je la 22-a horo, la plejmulto de la membroj kaj de la kursanoj — metiistoj kaj laboristoj — laboris po 16 horoj tage, sed ĝuste ili estis la plej entuziasmaj kaj fervoraj. La kursojn dum tiuj jaroj plej ofte gvidis Mirčo Vasilev kaj Nikola M. Nikolov. Ĉiu aktivulo laboris sen ia ajn pago, sindone, idealisme. Por havigi monon por lupago de la klubejo kaj por abonoj al E-gazetaro ili preparis spektaklon en bulgara lingvo kaj prezentis ĝin en Trojan kaj en kelkaj vilaĝoj.

Post la militfaŝista puĉo de 1934 j. oni oficiale komencis rilati tute malfavore al la E-agado kiel komunista, kaj en la urbo oni ne plu povis malfermi kursojn por civitanoj, sed nur por lernantoj. Multajn kursojn gvidis la gimnazia instruisto Nikola Vasilev.

Dum la periodo inter la du mondmilitoj

Esperanto komencis disvastiĝi ankaŭ en la regiono de Trojan.

En 1924 j. la instruisto Ĥristo Kavrakov kaj la instruistino Marijka Lingorska gvidis E-kurson en v. Šipkovo. En 1928 j. Esperanton lernis Doĉo Raĉev kaj Petr Markov en v. Borima. En 1903 j. Ivan Tarnovski gvidis E-kurson en v. D. Dol. En v. Ĉiflik bone ellernis Esperanton Bančo Terziev, Koljo Ĉukovski, Daĉo Haĝijski, Petko D. Marinov k. a.

Unuopaj esperantistoj estis en v. Dobrodan (fratoj Bajraktarov), Vrabevo (Ĥr. Papazov), Debnevo (Stefan Bojaĝiev), Ĉerni Osâm (Ivan Raĉev), Orešak (Laljo Bojkov) k. a. En Trojan aperis nova ondo da esperantistoj kiel Stančo Banĉev, Petko Seizov, Ĥristo Vodeničarov, Stojĉo Šoškov, Mustafa Aĥmedov, Vasil Penĉev, Minko Nankovski, Kino kaj Georgi Kukuviŝki k. m. a.

Dum la pezaj jaroj de la Dua Mondmilito multaj esperantistoj el Trojan kaj ĝia regiono aktive partoprenis la kontraŭfaŝistan batalon. La fratoj Minko kaj Ivan M. Conkovski estis en koncentrejo, Minko Kukuviŝki, Doĉo Sâev estis partizanoj (la lastaj du pereis en la batalo), Ĥristo M. Conkovski ankaŭ estis mortigita.

Post la 9 du septembro 1944 en Trojan kiel en nia tuta libera patrolando Esperanto tre bone disvastiĝas. La sindonemo de la pioniroj estas modelo por la novaj E-generacioj.

Laŭ la raporto de VASIL MITOVSKI dum la solena celebrego de la 70-jariĝo de Esperanto en Trojan

LA CELEBRO DE LA 70-JARA JUBILEO DE IVAN CANEV

Je la 5-a de decembro 1973 la sofiaj esperantistoj esprimis sian estimon kaj rekonon al la senlaca duonjarcenta E-agado de k-do Ivan Canev — unu el la veteranoj de nia E-movado.

Raporton pri la vivo kaj E-agado de k-do Canev faris d-ro Stojan Moresku.

Varme salutis la jubileulon reprezentantoj de multaj organizaĵoj: Nikola Aleksiev, prezidanto de Bulgara E-Asocio kaj de MEM — en la nomo de la centraj estraroj de tiuj organizaĵoj (li ankaŭ enmanigis al li memorhorloĝon), Georgi Dolapĉiev — prezidanto de la Distrikta Komitato de BEA en Sofio, Nano Nanov — prezidanto de la Sofia E-Societo „M. Gorkij“, Kunĉo Vălev — prezidanto de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“, Katja Maneva — el la Poŝtista E-Societo „Heroldo“, Petr Popnikolov — el la Aŭtotransporta E-Societo. Ĉiuj substrekis la sindonon, obstinan kaj senprofiteman E-agadon de k-do Canev. Iian fidelecon al Esperanto, al la amikeco kaj la paco inter la popoloj.

Al la kara jubileulo oni prezentis memordonaĵojn kaj bukedojn da floroj.

Responde k-do Canev alvokis ĉiujn labori sindone por la sukceso de nia kara E-afero, por la prospero de nia socialisma patrolando, por la triumfo de la socialismo.

Iv. Canev respondas al la salutoj



K-do Ivan Canev naskiĝis en 1903 j. en v. amovodene, distrikto de Veliko Tŕnovo, en multnombra familio de agrikulturisto.

Post la fino de la gimnazia studado en 1923 j., li devis serĉi laboron ne havante ionrimedojn por studi en la Universitato.

Li volis esti instruisto en sia naskiĝloko, sed pro liaj progresemaj ideoj oni ne onis al li laboron. Tial li iris al la suda rando e nia lando, al la regiono de Rodopi-montaro. Ĉi tie pro ega bezono de instruistoj oni nificigis lin kaj 9 jarojn li laboris kiel instruisto.

Foreste studinte en la financadministrativa fakultato de la tiama Libera Universitato en Sofio, li diplomiĝis kaj ekde la printempo de 1932 j. iĝis bankoficisto. En 1962 j. li emeritiĝis.

La socia agado de k-do Canev estas granda. Iel gimnaziano, li kun aliaj lernantoj fondis nriantan kulturklerigan societon en sia naskiĝvilaĝo, kies unua prezidanto li mem fariĝis. a societo disvolvis vigan agadon: fondis bibliotekon, organizis prelegojn, preparis teatrajn vesperojn kaj spektaklojn — disvastigis la progresemajn ideojn inter la loĝantaro. i tiu populatila agado de la societo estis sigita pro la faŝista puĉo de la 9-a de junio 1923, kaj la societo mem — malpermesita.

Dum la printempo de 1923 en urbo Veliko Tŕnovo en la lasta klaso de la gimnazio li omencis lerni la internacian lingvon Esperanto.

La aŭtunon de la sama jaro, jam instruisto, komencis korespondi kun eksterlando kaj gанизis sian unuan E-kurson.

Per Esperanto k-do Canev kreis ligan kun versaj esperantistoj el multaj landoj, inklusive Sovetunio. Regule li ricevis eldonatajn en SSR librojn pere de Germanio kaj Francio. o por ĉiam ligis lin kun la E-movado kaj plis por la disvolviĝo de lia kulturo kaj ogreŝema formiĝo.

Dum tiu tempo li ricevis la revuojn „Senaciulo“ kaj „Sennacieca revuo“ — ĝis la ismo en la Sennacieca Asocio Tutmonda AT) en 1931. En „Senaciulo“ li publikigis formajn artikolojn kontraŭ la reakcia reĝimo Aleksandr Cankov en Bulgario sub la pseŭnimoj „Julo“, „4100-ulo“ k. a.

En 1961 oni elektis lin en la estraro de la turba E-Societo „Maksim Gorkij“ en Sofio. En 1968 li estis elektita kiel sekretario de Sofia Distrikta-Komitato de BEA.

Ekde 1971 oni komisiis al li la financan adon de la Korespondaj kaj Someraj Instruij E-Kursoj.

Laŭ lia iniciato la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“, malfermis sian stencilan fakon. Dum lkaj jaroj la financa stato de la societo ave stabiligis.

En la preparo kaj efektiviĝo de la 48-a Unversala Kongreso de Esperanto, okazinta en Sofio en 1963, k-do Canev partoprenis aktive, organizante kaj plenumante ĝian financan agadon. Tiu lia agado estis alte taksita de la Estraro de UEA, pro kio ĝi sendis al li dankan leteron.

Ekde 1963 li estis elektita kiel sekretario de la Bulgara Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiun postenon li okupas ĝis la Sesa Konferenco de MEM en Beogrado (1973). De monato aŭgusto 1970 ĝis 1973 Canev estis ankaŭ centra administranto de revuo „Paco“.

Kiel bona posedanto de la lingvo kaj metodikisto, li ofte recenzis gravajn E-instruhelpilojn — vortarojn, lernolibrojn, gramatikojn k. s.

Li gvidis multajn E-kursojn, prelegis dum kunveno pri lingvaj kaj aliaj demandoj. Multfoje li okupis la unuan lokon en la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“.

Vera internaciisto kaj amiko de la vjetnama popolo, k-do Canev kolektis milojn da subskriboj proteste kontraŭ la usona agreso en Vjetnamio, iniciatis kunvenojn defende al la justa batalo de la vjetnama popolo, kolektis helprimadojn por ĝi, disvastigis milojn da ekzempleroj de vjetnamaj eldonaĵoj inter la bulgaraj esperantistoj. Pro tio li ricevis dankleteron de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

Dum sia duonjarcenta Esperanta vivo k-do Canev multe kontribuis por la disvastiĝo de Esperanto en nia lando.

Okaze de la 60-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio li ricevis ateston kun la ora jubilea insigno kiel aktiva E-veterano.

K-do Ivan Canev estas konata inter la bulgaraj esperantistoj kun sia honesteco, modesteco kaj laboremo, kun sia amo kaj fideleco al Esperanto kaj la noblaj idealoj de la E-movado pri amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj, pri paco sur la tero. Lia socia, politika kaj esperantista agado estas bona ekzemplo por la bulgaraj esperantistoj.

Karaj geesperantistoj,

Abono al „Bulgara Esperantisto“ estas ankoraŭ ebla. Abonu ĝin, abonu aliajn al ĝi — pere de la Estraro de Via Esperanto-Societo!



Granda avantaĝo por la instruistoj-esperantistoj en Sofio estas ilia E-klubo, kiu disvolvas viglan agadon sub la aŭspicio de la Centra Domo de Instruistoj (CDI). Ekde la unuaj tagoj de sia ekzisto la E-Klubo havas je sia dispono la centran ĉambron, kiun ĝi rajtas uzi laŭ speciala decido de la Estraro de CDI. Ĉi tie okazas ĉiusemajnaj vesperaj renkontiĝoj de la instruistoj-esperantistoj, kiuj havis kaj havas tiamaniere la eblecon konversacii ĝis pensatiĝo, aŭskulti prelegojn je diversaj temoj, pridiskuti lingvajn kaj gramatikajn demandojn, perfektigi siajn esperantajn kaj fakajn konojn, plivastigi siajn sciencajn horizontojn, ĝustigi sian vidpunkton rilate al la nova revolucioplena tempo, renkonti siajn enlandajn kaj eksterlandajn amikojn-esperantistojn kaj montri al ili la amikecon kaj la gastamecon de la bulgaroj.

Ĉiumerkrede je la kvina horo posttagmeze la ejo pleniĝas de instruistoj-esperantistoj. Ĉirkaŭante la longan tablon la ĉeestantoj atente aŭskultas prelegantojn, deklamantojn aŭ modelan elparolon de fame konataj esperantistoj pere de gramofondiskoj. Ofte oni estingas la lampojn kaj ĉiuj direktas okulojn al la malgranda blanka ekrano, fiksita sur la muro, kie bildoj bonege ilustras la vortojn de la preleganto.

Estas vesperoj, kiam aŭdiĝas E-kantoj, ĉu el la buŝoj de la ĉeestantoj, ĉu el la laŭtparolilo de la gramofono. Tiam en la klubejo regas vere esperantista etoso kaj tiuj vesperoj restas neforgeseblaj por la ĉeestantoj. . . Tie ne malofte legas unuafoje siajn verkojn (ĉu rakontojn, ĉu versaĵojn) niaj verkemaj samideanoj: Nevena Nedelĉeva, Prodan Prodanov, Stefan Kiraĝiev k. a. Ankaŭ mi ĉi tie kuraĝis legi miajn unuajn originalajn kaj tradukitajn versaĵojn.

Ne estas esceptoj, kiam al ni venas gastoj kaj prelegantoj el aliaj E-societoj.

Ĉe ni gastas ankaŭ alilandanoj — amikoj de niaj klubanoj. Ni havis la plezuron aŭskulti kaj paroli kun Friedel Greif el Leipzig (GDR), kun d-ro Tibor Szabo el Szeged (Hungario), kun Jo Shaten el Haarlem (Nederlando) k. a. De ili ni ricevis informojn pri la E-movado en iliaj landoj, pri la stato kaj la vivmaniero de ties laboruloj k. a.

Se vi estus vizitinta nian klubejon, vi povus havi la plezuron aŭskulti eĉ fakajn prelegojn: „Pri la kuirarto“ de Rajna Arnaudova, „Pri la mekanikaj muzikiloj“ kaj „Trakologio“ de Boris Simeonov, „La oceanoj ankaŭ povas morti“ kaj „Pri la formikoj“ de Todorcka Dunĉeva, „Matematiko en la naturo“ de Janka Daskalova, „Pri la signifo de la arbaro“ kaj „Germandevenaj radikoj en Esperanto“ de Neofit Spasov, „La sunmovado“ kaj „La kalendaro“ de Simeon Hesapĉiev, „Sovaĝaj kaj kulturaj plantoj en Bulgario“ kaj „La bulgara domo dum kvin jarcentoj“ de Petja Ĉakova, „Ĉu ekzistas mirakloj“ de Dimitr Borisov, „La Preĝejo de Bojana“ de Cvetana Petrova k. a.

Kelkfoje ni amuziĝis aŭskultante la tradukitajn de Janka Daskalova, spritaĵojn el Gabrovo kaj aliajn anekdotojn pri fame konataj personoj.

Estas jam kutimo, ke ĉiu klubano rakontu pri siaj imperesoj kaj travivaĵoj dum eksterlandaj vojaĝoj, montrante ĉu E-presajaĵojn aŭ E-faldfoliojn, ĉu kolorajn diapozitivojn aŭ ilustritajn poŝtkartojn. Tiamaniere ĉiuj instruistoj-esperantistoj estis informitaj pri la universalaj E-kongresoj en Londono kaj Beogrado, pri la konferencoj de ILEI en Budapeŝto kaj en Maribor.

Oni prelegis ankaŭ pri kelkaj gravaj punktoj el la E-gramatiko, ekzemple pri iuj prepozicioj kaj prefiksoj aŭ pri tute fakaj demandoj, kiel ekzemple la prelego de Violin Oľanov pri „Iuj metodikaj demandoj de la E-instruado“ aŭ „La

preciza loko de Esperanto en la fremd-
lingva instruado" laŭ Helmut Sonna-
end, prezidanto de ILEI.

La Estraro de la klubo estas en-
teraj amikaj rilatoj kun E-klubo en
iaj landoj kaj interŝanĝas spertojn
aj E-kantojn kun ili. Estas ege de-
strataj novaj kontaktoj kun alilandaj
instruistaj aŭ neinstruistaj E-klubo por
interŝanĝo de spertoj, E-kantoj, prele-

goj kaj diversaj esperantajoj. Se vi
interesiĝas pri nia agado, skribu al la
prezidanto de la E-Klubo de Instruis-
toj-Esperantistoj — instruisto de ger-
mana lingvo en mezgrada teknika
lernejo pri aŭtotransporto je adreso:
*Marin Băcev, P. K. 1054, Sofia C,
Bulgario.*

Marin Băcev

ZAMENHOF-CELEBROJ

Sofio. La sofiaj esperantistoj solene cele-
bris la 114-an naskiĝtagon de d-ro Zamenhof.
Je la 12-a de decembro ili kolektiĝis en la
salonon de la urba E-Societo „Maksim Gorkij“.
Raporton pri la afero de Zamenhof kaj pri la
nova periodo de la E-movado faris nia E-pioniro
Atanas D. Atanasov, vicprezidanto de la Aka-
demio de Esperanto.

Estis prezentita belarta programo. Aparte
ortuŝa en ĝi estis la partopreno de Veselin
Nev (lernanto de la VIII klaso) kaj Branimir
Vălev (en la VI klaso), kiuj rakontis pri sia
veturado al Beograd kaj partopreno en la 13-a
internacia Infankongreseto. Ili plenumis ankaŭ

la programon, kiun ili prezentis tie (el de-
klamadoj, kantoj, humuraĵoj).

Je la 14-a decembro en la restoracio „Alen
Mak“ okazis amika bankedo, amase vizitita de
la esperantistoj.

Kazanlâk. Je la 12-a de decembro „Roza
Valo“ organizis Zamenhof-celebron. Raporton
pri la vivo kaj agado de la kreinto de Espe-
ranto faris Dončo Hristov.

Stara Zagora. E-Societo „Fervoĵisto“
celebris la Zamenhof-naskiĝtagon per kunveno
kun raporto de Enčo Mitev kaj belarta pro-
gramo.

EN PAZARĜIK PROPRA ESPERANTO-KLUBO

Per propraj rimedoj, per helpo kaj subteno
de ĉiuj lokaj aŭtoritatoj kaj de CK de BEA,
la Distrikta E-Komitato en urbo Pazarĝik
konstruas propran klubojon sur str. Gruko 3-a.
En la klubejo estas: kancelario — sufiĉe vasta
por enteni ankaŭ bibliotekon, kaj se necese en
ĝi povus funkcii nemultnombra kurso; sa-
lono — entenanta proksimume cent sidlo-
kojn (en ĝi estos tabloj por pli multnombra
kurso).

Estas antaŭvidataj modernaj teknikaj hel-
piloj por E-instruado. Tial ni bezonas espe-
rantlingvajn gramonfondiskojn kun muziko
kaj parolo, magnetofonajn programojn, dia-
gramojn kaj diafilmojn, eĉ kinofilmojn (la
longo 8 mm), esperantlingvajn librojn kaj ler-
nehelpilojn ktp. Ni petas la gesamideojn
kaj ĉiuj landoj helpi nin per tiaj iloj. Ni rekom-
encos ĉion ricevitan, ĉu per bulgara gramon-
fondisko en Esperanto, ĉu per bulgara belarta
libro en Esperanto, ĉu per alia esperantaĵo.

La solena malfermo de la klubo okazos ve-
staje la 24-an de majo 1974 j. — la feston
de la bulgara nacia kulturo kaj skribo.

Geamikoj el la tuta mondo, ni atendas viajn
kontribuojn. Sendu ĉion je adreso: **Bulga-
rio, Pazarĝik, str. N. Popkonstantinov 40,
Petko Arnaudov** (por la Esperanto-klubejo).

Pri represo kaj alimaniere diskonigo de nia
anonco ni anticipe dankas.

*Esperanto-Societo „Vekiĝo“ en u.
Ŝumen — Bulgario, invitas ĉiujn ami-
kojn, kiuj vizitas nian landon, skribi
pri siaj impresoj. Ili estos legataj dum
letervesperoj en majo kaj aŭgusto
okaze de la 30-jara jubileo de la
socialisma revolucio en nia lando. Al
la partoprenantoj estos disdonitaj pre-
mioj. Skribu al adreso: Esperanto-
societo „Vekiĝo“, P. K. 60, Ŝumen,
Bulgario.*



En sia ĉefartikolo (n-ro 2/1973) „Kolektanto“ — informas bulteno de Klubo de Esperantistoj „Amika Rondo“ en Sofio, sekcio de Bulgara E-Asocio, substreka la fakton, ke en la mondo estas miloj da esperantistoj-filatelistoj, sed la pli granda parto de ili restas ekster iun organizon de kolektantoj, interalie oni skribas:

“Ĉiu el la ekzistantaj organizaĵoj eldonas propran, sed modestan informilon. Tiamaniere disigante siajn malabundajn financajn, intelektajn kaj moralajn fortojn, la esperantistoj-

kolektantoj ne sukcesis ĝis nun fondi vivkapablajn organizaĵojn, kiu helpu en ilia strebado.

Ni opinias, ke ekzistas favoraj kondiĉoj por fondo kaj prospero de forta tutmonda organizaĵo de kolektantoj-esperantistoj. Unuigante siajn disigitajn fortojn ili povos ankaŭ fondi solidan revuon, kiu kontribuos por la realigo de iliaj celadoj. . .

Ni atendas proponojn kaj opiniojn de ĉiuj sindonaj esperantistoj-kolektantoj. . . “

Adreso de la redakcio: „Kolektanto“, P. K. 5, Sofio 13, Bulgario“.

EL LA VIVO DE MEM EN BULGARIO

Publikaj kunvenoj estis organizitaj en la distriktaj urboj Smoljan, Burgas, Kjustendil, en la ĉefurbo Sofio k. a. En ili estis traktita de oratoroj de MEM la temo pri la okazinta en Moskvo Pacforumo kaj emfazita la partopreno de esperantista delegitaro de MEM.

La kunveno en Smoljan aprobis la jenan rezolucion:

„La esperantistoj kaj la simpatiantoj de la internacia lingvo Esperanto, partoprenintaj la tuturban kunvenon en la salono de Profesiaj Unuiĝoj, dediĉitan al la decidoj de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo, plej energie protestas kontraŭ la faŝistaj persekutoj de la demokratoj en Ĉilio kaj Urugvajo. Ni insistas pri tuja liberigo de la

herooj de nia nuntempo Luis Korvalan kaj Rodnej Arismendi, inkluzive la ceterajn ĉiliajn kaj urugvajajn patriotojn!“

Oratoro estis la sekretario de la Distrikta Komitato de BEA Stefan Pavlov.

En Burgas prelegis Georgi Dolapĉiev.

La kunveno en Kjustendil estis organizita komune de DK de BEA, la Urba Komitato por Defendo de la Paco kaj la Urba Komitato de la Patrolanda Fronto. Ĉeestis multaj neesperantistoj. Speciale estis farita informo pri la partopreno de delegitaro de MEM en la Moskva Pakongreso kaj celebrata la porpaca agado de D-ro Zamenhof okaze de la 114-a datreveno de lia naskiĝo. Oratoro estis la prezidanto de MEM.

PER ESPERANTO — EN FRATA ĈEĤOSLOVAKIO

Esperanto-Societo „Ivan Vladkov“ en u. Drjanovo subtenas tre viglajn kontaktojn kun eksterlando.

Pasintjare grupo da esperantistoj kune kun la dancensemblo de Popola Legejo „Iv. Vladkov“ en Drjanovo partoprenis en la Kultura Turista Esperanto-Semajno en u. Banska Bistrica — Slovakio. La semajno estis organizita de la slovakaj esperantistoj kune kun la Kultura Centro en la urbo.

Krom ni la Semajnon partoprenis ankaŭ esperantistoj el Hungario, Rumanio, GDR, Pollando kaj, nature, el ĈSR.

Enkadre de la Semajno nia dancensemblo prezentis tri koncertojn: ĉe la malfermo kaj la fermo de la Semajno kaj antaŭ la junpioniroj de la Internacia Tendaro. Ĉiuj prezentoj estis tre sukcesaj. Per siaj popoldancoj, kantoj kaj buntaj popolkostumoj la ensemblo ravis ĉies korojn. Ĉiam ĝi estis tondre aplaudita kaj superŝutita per floroj.

Jam la sekvan tagon la loka gazetaro re-

ehis entuziasme. La distrikta ĵunlaro „Smer“ skribis: „La bulgaroj ravis nin.“ La revuo „Esperantisto Slovaka“ (n-ro 7—8) skribis same: „Ĉarmega estis la bulgara ĵunlara arta grupo, kiu en belegaj naciaj kostumoj (broditaj), per siaj programeroj, akompanataj de tipa muziko, ravis ĉiujn ĉeestantojn dum du artaj vesperoj.“

La gvidantaj slovakaj esperantistoj, taksante alte la bulgaran ensemblon, invitis ĝin gastigi en Banska Bistrica en 1974, kiam tie okazos grandaj solenaĵoj lige kun la 30-a datreveno de la liberigo de Slovakio el la hitlerana jugo.

La bulgara grupo konatiĝis kun la vidindaĵoj de B. Bistrica, centro de la nacia slovak-a revolucio, de la bataloj kontraŭ la hitleranoj. Poste ni traveturis aŭtobuse ĉ. 500 km kaj ĝuis la belaĵojn de frata Slovakio. La impresoj de ĉiuj restos neforgeseblaj.

Georgi Manev

Dediĉe al la glora 30-a jubileo de la socialisma revolucio en nia lando (9.X.1944 j.) la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas grandan literaturan konkurson.

Partopreni povas ĉiu bulgara aŭ eksterlanda esperantisto. La nombro de la verkoj, originalaj kaj tradukitaj (rakontoj, skizoj, eseoj kaj versaĵoj) ne estas limigita.

Limtempo por prezenti la konkursojn: 30 de junio 1974 j.

Speciala jurio prijuĝos kaj premios la plej bonajn verkojn. Kelkaj el ili aperos en „Bulgara Esperantisto“.

La konkurso estas sekreta. La maŝine

aŭ mane (sed sufiĉe legeble!) skribitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermitan koverton, en kiun anticipe oni metu slipeton kun la vera nomo de la aŭtoro kaj ties konstanta adreso. La materialojn kaj la fermitan koverton oni metu en pli grandan koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo, kaj sendu ĉion rekomendite al adreso: „Bulgara Esperantisto“, bulv. Ĥristo Botev 97, Sofio (por la konkurso).

Gekamaradoj, amase partoprenu nian Literaturan Konkurson!

Junia esperantisto

ESPERANTO-TAGOJ EN ĤASKOVO

Je la 10—11 de novembro 1973 en la bela trakia urbo Ĥaskovo okazis la unua nacia konferenco de lernantoj-esperantistoj.

En sabato la granda halo de la Junulara Domo en la urbo malfermis gastame sian pordon por la partoprenantoj de la konferenco — pli ol 300 mezlernejoj el 22 urboj.

La unuaj alvenis la lernantoj el Vraca, Varna, Sofio, Plovdiv kaj Stara Zagora, ne malfruis ankaŭ la grupoj el Ŝumen kaj Targoviŝte, el Smoljan kaj Kalofer, el Karlovo, Marica, Pärvomaj kaj Pirdop. Alvenis reprezentantoj ankaŭ el Peŝtera, Gorna Orjahovica, Dimitrovgrad, Loveĉ, Jambol, Pernik, Drjanovo k. a. La unua tago estis tago de interkonatiĝo. La vesperon de la scenejo eksonis bulgaraj kaj Esperantaj kantoj, ekviglis popoloj kaj modernaj dancoj.

En tiu bolanta pro juneco kaj gajeco atmosfero mi prenis la notlibreton kaj ekiris inter la dancantaj gejunuloj. Unue mi haltigis kaŝtankoloran knabinon, kiu ridetis al mi:

— Kiel vi estas nomata? — mi demandis ŝin. — De kiam vi estas esperantistino kaj de kie vi estas?

— Mia nomo estas Reneta Ĉoneva. Mi lernas en teknikumo por mekanikigo kaj aŭtomatigo de la vilaĝmastrumo kaj mi estas de Ĥaskovo. Aŭtune de 1972 mia instruistino de

franca lingvo Mavruda Ĥristozova ekbruligis en mi la fajron de tiu facila kaj tiel agrabla lingvo — Esperanto. Komence ni estis nur kelkaj knabinoj, sed poste aliĝis multaj aliaj, kaj nun la Esperanto-grupo nombras 60 homojn. Ĉe la civitana E-societo en nia urbo estas junulara sekcio, kie ni membras. Interese estas ĉe ni. Ni havas regulan korespondadon kun lernantoj-esperantistoj el Pollando, Hungario, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio k. a. Ĉar nia instruistino translokiĝis en Sofion por studi, ekgvidis nian grupon k-do Idakiev. Kun li ni organizis kelkajn ekskursojn tra la lando kaj al eksterlando.

— Kaj kiam vi kolektiĝas? — mi sciivolimis.

— Post la lasta lernohoro ni kolektiĝas en nian klubojn kaj ĝis malfrue ni lernas kantojn, versaĵojn de Botev, de Vapcarov. . .

— Kial al vi plaĉas Esperanto?

— Por mi tio estas bela lingvo, lingvo de la amikeco inter la popoloj, lingvo, per kiu oni povas paroli kun polo kaj ĉeĥo, kun negro kaj japano. Ĉi tie jam ne estas lingvaj baroj. Ĉie lumas la verda semaforo de la interkompreniĝo. Ni gajnas ĉiam novajn kaj novajn amikojn, ĉar Esperanto estas lingvo de la junaj homoj en



la mondo, kiuj volas vivi en paco kaj amikeco.

Mi lasis Reneta gaji kun siaj amikoj kaj gastoj, venintaj al Haskovo.

La sekvan tagon, dimanĉe, ĝuste je 9.30 h. ĉiuj grupoj estis pretaj por la solena malfermo de la konferenco. Ekflritis la verdaj standardoj, ekludis fanfaroj.

Antonia Spasova — vicprezidantino de la lernanta E-sekcio ĉe la Junulara Domo en Haskovo malfermis la konferencen.

Raporton pri Esperanto kiel internacia lingvo kaj pri la taskoj de la junaj esperantistoj faris ing. Angel Todorov — sekretario de CK de BEA.

Sincere salutis la junajn konferencanojn

k-do Dinko Atanasov — sekretario de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio.

Entuziasme salutis ilin ankaŭ la E-veterano k-do Luka Vâlcanov — prezidanto de Esperanto-Societo „Asen Zlatarov“ en Haskovo. Interalie li diris: „Mi kredas, ke post kelkaj jaroj vi venos ĉi tien jam kiel spertaj esperantistoj. Multaj el vi certe estos instruistoj de novaj esperantistoj. Mi esperas, ke post dek jaroj nia Junulara Domo en Haskovo estos nesufiĉa por enteni la Esperantan ondon...“

Estis elektita provizora Komitato el reprezentantoj de 15 urboj, kiu gvidos la E-laboron inter la lernantoj.

Paulina Neceva

VINTRA E-SEMAJNO EN PAMPOROVO

sub la aŭspicio de Monda Turismo

Oni rakontas, ke en Ramporovo antaŭ multaj jaroj vivis arbohakisto, kiu disportis tra la vilaĝoj lignon ŝarĝitan sur azenoj. La azenoj estis ligitaj vice unu post la alia, kaj oni ilin nomis „pampor“, kio en la turka lingvo signifas vagonaron. De tie alvenas la nomo de Pamporovo — unu el la plej belaj ripozlokoj de Bulgario.

Jam delonge la arbarhakisto ne vivas, sed inter la jarcentaj pinoj, kie estis lia modesta loĝejo, nun blankas modernaj hoteloj, ripozdomoj kaj restoracioj.

Pamporovo estas alloga kaj plezure vizitata de miloj da fremdlandaj turistoj. Kaj en la konversacioj de la ripozantoj oni ofte aŭdas ankaŭ la belsonan Esperanto-parolon.

De la 1-a ĝis la 7-a de februaro tie ĉi por la tria fojo oni aranĝis Vintran E-Semajnon.

Ne de la unua tago — jam de la unua momento la partoprenantoj en la Semajno ekvivis la vivon de „rondo familia“, utiligante la komunan lingvon kaj kunigitaj per la noblaj ideoj de la E-movado.

La unua februara tago estis sunoplena kaj trankvila. La ripozrestadejo de „Gorubso“ ĉiun

pasantan horon pli kaj pli viviĝis. Alvenadis esperantistoj el diversaj urboj de la lando kaj la organizantoj de la Semajno — k-do Jordanov — prezidanto de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan kaj k-do Nikolov — ĝenerala sekretario de Monda Turismo, rapidis por renkonti kaj loĝigi la gastojn.

En la hejmeca antaŭsalonego oni povis aŭdi la unuajn viglajn interparoladojn. Maljuna esperantisto el Hungario konversaciis gaje kun du simpatiaj junuloj el najbara Jugoslavio kaj junaj esperantistoj el la urboj Madan kaj Sofio. Ni rapidis interkonatiĝi, ja tutan semajnon ni devis pasiĝi kune.

Frue la sekvantan tagon la granda anaro ekiris al montopinto Snejanka vualita de blanka mantelo. La lifto levis nin super la pinoj kaj rapide ekportis nin supren, supren. Suririnte la Rokon de Orfeo ni longe ĝuis la lumigitajn de la februara suno montajn deklivojn, proksimajn kaj malproksimajn. Trankvile sub gla-

(Sur p. 18)

BELSONA — 74

„BELSONA — 74“ estas la nomo de la nova orkestro, fondita ĉe uzino „ZITA“ en la danuba urbo Ruse. Dum la novjara festo oni anoncis la decidon de la jurio de l'konkurso pri la elekto de nomo. Mondoninto estigis la esperantisto Georgi Dobrev.

La grupo estas nova, sed juna kaj esperiga. Dum la kuranta jaro ĉiuj orkestranoj komencis lerni Esperanton. Nun ili serĉas kontaktojn tutmonde.

Adreso: Bulgario, Ruse, uzino „ZITA“, BELSONA — 74



ria kovrilo dormis la belaj Smoljan-Lagoj. Poste kun multe da rido kaj ĝojo ni komencis malsupreniri. Ni glitadis, falis en la neĝon, batetis unu la alian per neĝbuloj.

Kaj ekviciĝis tago post tago en promenadoj aj ŝercoj. La montaro reĉhis pro niaj senzorgaj voĉoj kaj kantoj. Dum la tago ni vaŝis laŭ paŝpremitaj neĝvojetoj kaj restis mutaj intaŭ la belega naturo, sed vespere ni kunvenadis en la ripozdomon, kie komenciĝis muzoj, ludoj kaj dancoj.

Tamen en Pamporovon ni kunvenis ne nur por agrabla vintra ripozo, sed antaŭ ĉio kun la penso pri Esperanto. Kaj kune kun la senĉesaj interparoloj en kaj pri Esperanto ni spektis diapozitivajn, momentojn el la pasintjara E-renkontiĝo en Pamporovo, el vizitoj de bulgaraj esperantistoj en Hungario k. a. Ni pridiskutis lingvajn demandojn, lernis E-kantojn, dancis laŭ la melodioj de estradaj gramofondiskoj de niaj plenumantoj en Esperanto.

Neforgeseblaj restos por ni la ekskursoj al Smoljan kaj vilaĝo Ŝiroka Laka, la vizito en la etnografia muzeo de Smolajn kaj en la unika, riĉenhava muzeo en la domo de d-ro Karov en Ŝiroka Laka.

Kiel nerimarkeble pasis ses tagoj!

La lastan vesperon niaj karaj gastoj estis esperantistoj de Smoljan-distrikto. Kaj denove ĝis malfrua vespero gaja rido sonigis la ripozdomon, estis konkursoj, premioj ktp.

EL LA AGADO DE „ANNE FRANK“

La Lernanta E-Societo „Anne Frank“ ĉe la faklernejo pri teksaĵoj en urbo Vraca disvolvas modelan agadon. La nombro de la societanoj atingis 125. Ĉiuj estas abonantoj de la asocio presorgano „Bulgara Esperantisto“. La speciala lernanta revuo „Juĉna Amiko“, eldonata en Hungario, havas ĉi tie 50 abonantojn.

Dum la unua lernosemestro okazis 35 kunvenoj — ĝeneralaj kaj grupaj. En la ĝeneralaj kunvenoj estis faritaj 7 prelegoj je temoj: „La Septembra kontraŭfaŝisma ribelo en Bulgario de 1923“, „Esperanto en servo de la paco“, „El la historio de la bulgara kaj internacia E-movado“, „La Esperanto-literaturo“ k. a. Dum la sama periodo estis organizitaj 4 belartaj vesperoj, dediĉitaj al Sovetunio, al d-ro Zamenhof, al urbo Vraca. Okazis ankaŭ du renkontoj kun veteranoj de la E-movado en nia urbo. Estis aranĝitaj montrofenestroj el leteroj, gazetoj kaj libroj, poŝtmarkoj, moneroj k. a., ricevitaj el la kvin kontinentoj.

La membroj de la societo vaste korespondas en Esperanto kun eksterlando. La societo interfratiĝis kun la E-klubo en Tabarz — GDR.

Grupo de 36 ĝeneralantoj partoprenis la Unuan Nacian Konferencon de Lernantoj-Esperantis-

Tie ĉi je la 6-a de februaro okazis plivas-tigita plenkunsido de la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan, responde al la Alvoko de CK de BKP, la Ministra Soveto kaj la Centra Konsilantaro de Bulgaraj Sindikatoj por dignoplena renkonto de la Nacia Partia Konferenco kaj la 30-jara jubileo de la socialisma revolucio en nia lando. Oni akceptis promeson pri plenumo de la antaŭstarantaj taskoj kaj alvokon al ĉiuj bulgaraj esperantistoj streĉe labori por antaŭlimdata plenumo de la 6-a kvinjara plano por disvolviĝo de nia lando survoje al la komunismo.

Alvenis la tago de la disiĝo. Nur dum unu semajno ni interkonatiĝis, ekamis unu la alian kaj ni eksentis malgajecon... sed antaŭ ni staras novaj renkontiĝoj: en Sviŝtov, en Kazanlak, la somera E-laborbrigado k. a.

Kiam mi adiaŭis kun mia nova amiko Jovan Zarkoviĉ, gimnaziano-esperantisto el urbo Panĉevo — Jugoslavio, mi demandis, ĉu al li plaĉis la E-Semajno en Pamporovo. Li estis afabla kaj sincera respondi: „Mi sentas min tre feliĉa, ĉar mi ne eraris, ke mi venis... Mi havis okazon ĝui la belegan Rodopi-montaron kaj varman E-medion kaj ekhavi novajn bonajn amikojn inter la bulgaraj esperantistoj.“

*Georgi Mihalkov,
studento — Sofia*

toj en Ĥaskovo (nov. 1973).

Ĉe la societo funkcias amatora foto- kaj kinoklubo kun 24 partoprenantoj. La klubo organizis projekciojn de diapozitivaj pri Soveta Estonio, Hungario kaj urbo Vraca. Nun oni preparas amatoran dokumentan filmon pri la E-movado en la urbo. Ĉe „Anne Frank“ funkcias E-biblioteko.

Nia societo iniciatis ankaŭ konkuradon inter la junaj esperantistoj en nia lando laŭ fiksitaj indeksoj.

Dum la kuranta jaro 5 klasoj lernas fakultative Esperanton. La direktoro de la faklernejo kaj la instruistoj alte taksas la agadon de nia lernanta E-societo.

*Plamen Vaĉev
prezidanto de „Anne Frank“*

Demandu viajn konatajn esperantistojn, ĉu ili abonis „Bulgaran Esperantiston“. Se ili ankoraŭ ne faris tion, tuj abonigu ilin! Devo de ĉiu esperantisto estas ricevi nian asocian organon!



TRA LA E MONDO

RENKONTIĜO DE SOVETA ESPERANTO- JUNULARO

Por nia movado regionaj renkontiĝoj gravas ne malpli ol someraj tutsovetiaj forumoj. Ili estas lokoj de viva lingva praktiko, de dividado de ideoj, spertoj kaj konsiloj kaj finfine — plej efikaj skoloj por konvinko kaj hardado de nia posteularo.

Je la 6—8 de novembro 1973 la centrurusa esperantista junularo la 8-an fojon kolektiĝis al jam iĝinta tradicia duonjara renkontiĝo. Akceptis ĝin gastamaj ivanovanoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj el Ivanovo, Moskvo, Kolomno, Kostroma, Gorkij, Ĥarkov.

La renkontiĝon malfermis la veterano de la E-movado Penčalov Aleksandr Fjodorovič — 75-jara ĉarpentisto. Tuj post la solena inaŭguro li komencis laborkunsidon per lokaj raportoj. Jen ilia sumigo.

Nun nian junularan regionan movadon en 7 urboj (krom la menciitaj ankoraŭ en Tula kaj Rjazan) partoprenas ĉ. 40 aktivuloj, kiuj gvidas en 15 rondetoj 200 komencantojn.

La plej menciindaj niaj faroj: arango de SEJT-14, eldono de kantareto „Kun kanto tra Esperantujo“, partopreno de Slava Ivanov en Internacia Junulara E-Tendaro en GDR. Rakonto pri ĝi kun demonstrado de koloraj fotoj estis aparta impresiga ero de nia programo. La unua tago finiĝis per komuna vizito de filmo.

La sekvan tagon ni eklaboris entuziasme. Post disputo pri instrumentadoj de Esperanto ni trarigardis reklaman E-filmon de firmao „FIAT“ pri elprovoj de ĝiaj novaj aŭtoj. Bonege sonigita kaj interesa filmo!

Tion sekvis rakonto de L. Medvedev pri la unua en Sovetunio konferenco, dediĉita al la planlingvoj (Moskvo, 24—27-an de oktobro 1972) kaj la Esperanto aparto.

Kronis la laboran ŝvitadon festa vespero en speciale luita por ni kafejo. Kantado, inspirata de Ljonja Borisov, kaj dancado daŭris ĝis la kvara horo matene. Satamuzintaj ni promenadis ekskurse tra la vekiganta urbo kaj Slava Ivanov rakontis al ni pri la glora historio de Ivanovo.

La 8-an matene post skiza raporto de Viktor Arolovič pri la agado de la Sovetia Es-

peranta Junulara Movado (SEJM) ni daŭrigis la ripozon en intima medio de studenta komunloĝejo.

Renkontiĝo! . . . Ĉu estas por vera esperantisto vorto pli alloga? Kio alia povas pli bone konvinki pri la vivpotenco de nia Movado, pli bone subteni nian kredon!? Nur tie ni trovas la rondon de esperantistoj-entuziasmuloj, la rondon de samideaneco, kiu estas grava elemento de la esenco kaj la feliĉo de nia esperantista vivo.

Leo Medvedev

ARBO DE L'AMIKECO

Ni ĉiuj esperantistoj, membroj de la Rondo ĉe la Palaco de la Junpioniroj, kun granda plezuro legas la revuon „Bulgara Esperantisto“, kiu donas al ni multajn sciigojn pri la E-movado. Ni kun sincera deziro ekvolis sendi malgrandan artikolon kun fotoj, kiuj ilustras tre interesan ekskurson al Soĉi. Tiu ĉi urbo situas sur la nigramara bordo, kaj en ĝi kreskas la fama Arbo de l'Amikeco. Eble vi ankoraŭ scias, ke famaj gastoj el 138 landoj, kiuj vizitis kaj vizitas nian landon, greftas citronarbojn. Se vi interesiĝas pri tio, ni povas sendi diversajn materialojn.

Nia ekskurso estis dediĉita al la naskiĝtago de d-ro Zamenhof. Ni kunprenis fruktojn de tiu branĉo, sur kiu ni greftis antaŭ kelkaj jaroj.

Kristina Kaĝaja, Kutaisi

La ekskursantoj apud la „Arbo de l'Amikeco“. La gvidantino de la Rondo, Kristina Kaĝaja, dekstre, la dua.



La konata Esperanto-pionirino **Ida Lisiĉnik** el urbo Kutaisi, Gruza Soveta Socialisma Respubliko, ĉi-jare festas sian 80-jaran jubileon. Salutante nian meritplenan veteraninon, ni

publikigas ŝian „Lastan Vorton“ adresitan al la esperantistaro, speciale al la E-junularo.

La Redakcio

Al la veteranoj kaj la junularo

LASTA VORTO

de Ida Lisiĉnik

Franca proverbo diras: „On dit, que le temps passe. C'est nous qui passons, le temps reste.“ (Oni diras, ke la tempo pasas. Pasas ni, la tempo restas.)

Efektive: forpasas unu post alia la homoj, inter ili niaj veteranoj. Sed la vivo kaj la ĝin movanta tempo daŭrigas sian kuradon, batalon, fiaskojn kaj venkojn. La vivo ne haltas. Sed en tiuj bataloj kaj venkoj troviĝas la postsignoj, la spuroj de la forpasintoj, de ilia idea servado, persista kaj abnegacia laboro. Tiujn miajn vortojn, eble la lastajn, mi volas direkti al miaj ideaj kunlaborantoj en la tuta mondo, al la vivantaj veteranoj de nia E-movado, kun kiuj ni kune, ne konante unu la alian, dum dekoj da jaroj defendis nian verdan remparon, kiel ajn malfacila kaj ofte eĉ senespera saĝnis nia batalo.

Kio devigas niajn verdajn aktivulojn fordonadi al tiu batalo siajn fizikajn kaj spiritajn fortojn, talentojn, animan trankvilon kaj ofte eĉ la bonstaton kaj harmonion en siaj familioj?

Kio devigas niajn E-verkistojn dediĉi siajn talentojn preskaŭ ekskluzive al la E-verkado, senperspektiva el materiala vidpunkto?

Kiom pli da trankvilo, bonstato kaj populareco multaj el ili ĝuus, se ili estus verkintaj en sia gepatra lingvo!

„Mi posedas tradukojn el miaj verkoj, — skribis Julio Baghy, — en la lingvoj angla, franca, germana, estona, linna, sveda, nederlanda, rusa, pola, ĵatva, katalona, hispana, hungara, ĉina, japana. La traduko estas trovebla sur la tero, sed la honorarioj — nur sur la luno.“ (El „Arĝenta duopo“ de Z.Hal-

ker, jubilea libro pri Julio Baghy kaj K. Kaloscaj, Budapeŝto 1937).

Sed se oni estus proponinta al li forlasi la Esperantan literaturan laboron kaj prefere dediĉi sian talenton al kreado en la gepatra lingvo, li sendube nur ekridus, ĉar estas ja neeble retiriĝi de la ideo, kiu penetris vian animon, vian cerbon, vian tutan vivon kaj en kies fina venko vi senhezite kredas. Ne grave, se ne ĉiuj batalantoj ĝisvivis ĝin.

Tamen, estus erare supozi, ke esperantistoj nur oferas, nenion ricevante por si mem. Fakte ili ricevas tian kontentigon, kompare kun kiu neniu alia rekompenco validas.

El mia propra sperto mi scias, kiom da spirita ĝojo kaj morala kontentigo alportadis al mi mia E-laboro kaj alportas ilin en la plej malfacilaj kaj eĉ tragikaj periodoj.

Labori kaj batali por unu el la plej noblaj ideoj de la nuntempo, konscii, ke per tiu laboro estas metata ankoraŭ unu malgranda briketo en la grandiozan konstruaĵon de la estonta homa socio, en kiu reciproka kompreno pere de komuna helplingvo kreas principe novan epokon en la homaj interrilatoj, bazitaj sur la sentoj de amikeco, simpatio kaj helpemo — ĉu tio ne povas alporti plej altan kontentigon kaj eĉ fieron!

Nur granda kaj nobla ideo kapablas krei apostolojn, altiri homojn, senrezerve fidelajn al ĝi kaj pretajn oferi por ĝi ĉion.

Eble al la plimulto de sobraj, praktikaj homoj ni aperas kiel Don-Kiĥotoj, sed prava estas Julio Baghy, dirante:



„Lingvo, por fariĝi vere vivanta kaj perfekta, bezonas tempon kaj tempon, poste fanatikajn revemulojn, kies agado estas pli praktika ol tiu de sobraj realistoj, kaj nur lastrange ĝi bezonas monon. Esperanto estos kaj restos nevenkebla dank' al la tempo kaj miloj da praktikaj revemuloj.“

Kaj nun kelkajn vortojn al nia junularo.

Se tiom da entuziasmo, persisto, aktiveco kaj nerompebla kredo je la ideo de internacia solidareco montras la maljunuloj, la veteranoj, por kiuj la praktikaj rezultoj jam preskaŭ nenion prezentas, do kiom pli altira devas esti Esperanto al la junularo, kiu ĉe siaj diversflankaj internaciaj kontaktoj sur ĉiu paŝo sentas la ŝajne nevenkeblajn barojn de la diverslingveco!

La natura aspiro de la junularo al intimaj kontaktoj, al senpera interŝanĝo de opinioj, al komuna politika kaj kultura agado estas ne nur limigataj, sed plej ofte paralizataj de reciproka nekompreneo.

Kiel humilige estas por junuloj komunikadi per signoj, kiel mutuloj. La junularo posedas propran aŭdacon, kuraĝon. Ĝi ne emas iradi la trabatitajn vojetojn, kaj nia soveta junularo tion pruvas en ĉiuj sferoj de la vivo, en la giganta konstruado de l'komunismo, en kiu la junularo ĉiam estas sur la frontlinio, timante neniajn malfacilaĵojn kaj obstaklojn. Kial do pri

la problemoj, kiu senpere tuŝas iliajn pure junulajn interesojn — la internaciajn kontaktojn, ili estas tiel indiferentaj, timemaj, kredemaj al ĉiu kritiko kontraŭ la Internacia Lingvo, eĉ se tiu kritiko estas produkto de nekonado de tiu problemoj, de antaŭjuĝoj kaj reakciemo?

Kial ili mem ne provas kontroli tiun kritikon? Ja tempon tio postulas nun minimuman! Ĉu ne la junularo devas montri ekzemplon de iniciato, agemo, aŭdaco?

Ĉu la junularaj E-kongresoj sen interpretistoj ne retulas la ŝablonan kaj senbazan kritikon, ke Esperanto ne konformas al la postuloj de viva internacia lingvo, ĉar ĝi estas artefarita?

Ja estas ne interese atendi, ĝis kiam la Internacia Lingvo, venkinta ĉiujn barojn kaj antaŭjuĝojn, estos dekretita de supre.

Partoprenu mem en la pli rapida venko de unu el la plej humanaj, noblaj kaj grandaj ideoj de la nuntempo — la Internacia Lingvo, lingvo sen privilegioj, apartenanta al neniu, humiliganta nenion. Ellernu ĝin mem kaj alligu al ĝi tiujn, kiuj ankoraŭ ne konas ĝin!

Kiel en multaj aferoj, la junularo devas okupi avangardan rolon ankaŭ en tiu nobla movado.

Kaj tiam ni, veteranoj, trankvile forpasos, kiam venos nia horo, kontentaj, ke niaj penoj ne estis vanaj, ke el niaj manoj vi prenis la stafeton kaj digne portos ĝin ĝis la fina venko de la senmorta ideo.

ORIGINALA KONKURSO

La E-Klubo „Instruisto“ ĉe Vilnius'a Instruista Domo anoncas konkurson. Ĝin rajtas partopreni ĉiu esperantisto el kiu ajn lando. La gajnintoj estos premiitaj per esperantaĵoj. Kondiĉoj de la konkurso:

Oni devas kompili la plej mallongan tekston, kiu enhavu

- 1) aŭ ĉiujn prefiksojn kaj sufiksojn,
- 2) aŭ ĉiujn prepoziciojn,
- 3) aŭ ĉiujn korelativojn,
- 4) aŭ ĉiujn radikajn adverbojn.

Konkursaĵojn bonvolu sendi ĝis la 1 de majo 1974 laŭ adreso:

2320 00 Vilnius, a. d. 149, Esperanto-klubo.

RADIO AŬSKULTANTOJ, ATENTU!

Radio Zagreb, kies Esperantlingva elsendo en 1973-a festis 20-jaran ekzisto-jubileon, informas, ke ekde la 8-a de marto 1974 ĝia elsendo por esperantistoj (ondolongo 264 m) okazas VENDREDON (ne plu ĵaŭdon), kvin minutojn post noktomezo laŭ MET.

Foje, sidante antaŭ la televida aparato kaj aŭskultante muzikon, mi tuj rimarkis, ke mi komprenas la vortojn de kanto en fremda lingvo. Komence mi ekpensis, ke tio estas itala kanto, sed streĉinte la atenton, mi komprenis, ke la kanto sonas en la internacia lingvo Esperanto.

Baldaŭ mi forveturis al Estonio, en la tendaron de esperantistoj. Ĉi tie mi aŭdis novajn kantojn kaj eĉ mi konatigis kun kelkaj aŭtoroj. Kaj dum la lastaj tagoj en la tendaro mi kaj mia amiko el Vilnius, Vitaŭtas Šilas, verkis la tekston de nia unua Esperanta kanto.

Komence la kantoj estis malmultaj. Kaj ni kolektis ĉiun. Poste aperis dekoj da aŭtoroj en ĉiuj anguloj de la lando. Eĉ tiuj, kiuj apenaŭ ekposedis la fundamentojn de la lingvo, prenis la plumon kaj komencis verki. Kaj ne ĉiam senrezulte. La kantoj estiĝis tiom multaj, ke por gajni popularecon ili devis elteni konkuradon.

Ĝuste tiam aperis la nesribita tradicio — alporti por la koncertoj de la E-tendaroj nur novajn kantojn. Kaj ĉar en ĉiu tendaro oni organizas kvar-kvin koncertojn, la partoprenantoj en ili alportas kelkdekojn de novaj kantoj.

La lingvo de la bona kanto — tio estas la lingvo de la amikeco. Tial la E-Komisiono ĉe la Unuiĝo de Societoj por Amikeco kun Eksterlando komencis eldoni kantarojn de soveta komponistoj, de kantoj el la tempo de la Oktobra Revolucio kaj la Civitana Milito, de kantoj de la sovetaj popoloj.

Mi rememoras, kiel dum la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio ni disdonis al la partoprenantoj pli ol du mil ekzemplerojn de simila kantaro. Kaj la tuta kongreso kantis en Esperanto „Estu ĉiam la suno!“.

Aparte plaĉaj estas la E-kantoj ĉe fajrujo. Ĉiam mi memoras la nokton

en Karpatoj, kiam ni sidis ĉirkaŭ fajrujo, plenumante petojn de niaj gekamaradoj, kiuj la matenon devis forveturi. La gitaristoj lacigis kaj anstataŭigadis unu la alian, de tempo al tempo nin vualigis nuboj, sed la kantoj sonis ĝis ĉe la horizonto leviĝis la suno.

La kant-ondo okupis ankaŭ la E-klubon de Ufa. Aperis niaj aŭtoroj, niaj plenumantoj, niaj gitaristoj. Niaj kantoj komencis soni en kulturdomoj, en institutoj, lernejoj, per la televido. Ni ilin kunperenis en ĉiuj niaj veturadoj al tendaro kaj konstrutaĉmentoj: al la Riga Marbordo kaj la Azov-regiono, al Altaj kaj la Karpatoj, al Dnepro kaj Apudmoskvo, al Siberio kaj, kompreneble, dum niaj ekskursoj tra Uralregiono.

Pri kio parolas la Esperantaj kantoj? — Pri la plej bona: pri nia ĉarma lando, pri amikeco, pri amo, pri bonaj homoj, pri ties revoj kaj streboj.

„Mi funkciigas la magnetofonon, kaj sub la sonoj de niaj kantoj — gajaj, seriozaj aŭ ŝercaj — mi rememoras pri proksimaj kaj malproksimaj amikoj, loĝantaj en ĉiuj anguloj de nia lando aŭ en aliaj landoj de la mondo: pri la amikoj, kun kiuj konatigis min la internacia lingvo Esperanto.“

Boris Kolker

El ĵ. „LENINEC“ organo de la Regiona Komitato de Baŝkiria Lenin-Komsomolo en urbo Ufa, n-ro 3/1974 ĵ.

BELAJ PROSPEKTOJ

La maŝinfabrika en Považska Bistrica, ĈSR, eldonis en Esperanto kolarajn prospektojn pri siaj motocikloj „Jawa 50 — typ 20—21, 23 A“, „Jawa Roadster 90“, „Trail 90“ kaj mopedo „Basetta“. Petu sepagajn prospektojn kaj esprimu dankon je adreso: *Maŝinfabrika, OTS, 01734 Považska Bistrica, Ĉeĥoslovakio.*



VERE INTERNACIA E-KURSO EN BUDAPEŝTO

En novembro 1973 komenciĝis Esperanto-kurso en Budapeŝto, en la studenta hejmo de TESCO (Instituto de Internacia Teknika kaj Scienca Kunlaborado). En Hungario tiu ĉi institucio okupas sin pri la antaŭ- kaj postuniversitata klerigo de junuloj el la „Tria Mondo“.

Kursanoj el 14 landoj

En la kurso partoprenas 24 junuloj el 14 landoj: Bengala Popola Respubliko, Peruo, Kamboĝo, Suda Jemeno, Libano, Etiopio, Panamo, Kubo, Urugvajo, Gvineo-Bissau, Gvineo-Conakry, Sudano, Cipro kaj Algerio. Oni uzas la noveldonitan lernolibron de d-ro Istvan Szerdahelyi „Esperanto Internacia“. La kurson gvidas Ēva Farkas-Tatár.

„Esperanto fariĝu hejma lingvo en similaj institucioj“

La 15-an de decembro en la moderna domo de la studenta hejmo okazis Zamenhof-festo. La ĉeestantojn — inter kiuj krom hungaraj esperantistoj troviĝis ĉ. 60 ekstereŭropaj studentoj — bonvenigis la direktoro de la studenta hejmo György Marián, kiu emfazis la gravecon de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Li skizis la gravajn lingvajn problemojn, kiujn prezentas la laboro en tiaspeca institucio. Li anoncis, ke li mem eklernis Esperanton, kaj esprimis la dezirojn, ke la Internacia Lingvo baldaŭ fariĝu „hejma lingvo“ de la studenta hejmo.

En la nomo de HEA kaj HEJ salutis la ĉeestantojn f-ino Ēva Tofalvy kaj Sándor Jakab. Poste Hector Villarroel (boliviano), prezidanto de la studenta estraro, transdonis libropremiojn al la plej diligantaj kursanoj.

Internacia kulturprogramo

La sekva ero estis esperantlingva kulturprogramo de la kursanoj. Ĝi estis vere internacia: la program-anoncanto estis Long Visalo el Kamboĝo. Plej elstaraj programeroj estis la jenaj:

José Antônio Correia el Gvineo-Bissau deklamis la poemon de Baghy „Sklavokanto“; Haile Negash el Etiopio prezentis la poemon „Sud-Afriko“ de Edwin de Kock; Sandalio Ramírez el Urugvajo deklamis la Kalocsay-poemon „La Zamenhofa Balado“.

„Estas necesaj pluaj kursoj“

La kulturprogramon sekvis amika renkontiĝo inter la hungaraj kaj novbakitaj eksterlandaj esperantistoj. Multaj eksterlandaj studentoj, kiuj partoprenis la feston kiel gastoj,

informiĝis pri la ebleco eklerni la lingvon. La direktoro de la studenta hejmo donis malgrandan akcepton por la esperantistaj gvidantoj, kiam okazis pluraj konkretaj interkonsentoj pri estonta kunlaborado. György Marián emfazis, ke estas necesaj pluaj kursoj, kaj anoncis, ke la studenta hejmo surprenas ĉiujn kostojn, kiel ankaŭ ĝis nun faris tion. La dua kurso verŝajne ekfunkcios fine de januaro.

La estraro de la studenta hejmo petas esperantistojn el anglalingvaj, francalingvaj kaj hispanlingvaj regionoj alsendi propagandan kaj instrumaterialon, ĉar la plimulto de la studentoj malbone aŭ tute ne regas la hungaran lingvon. La sendaĵojn oni bonvolu adresi al: *Studenta Hejmo TESCO (Por s-ro Haile Negash), Budapest XIV, Nagy Lajos király ut. 202, Hungario.*

TELEVIDA FILMO PRI ZAMENHOF

Televida filmo pri d-ro L. L. Zamenhof estis pretigita de la Pola Televido. La filmfotistoj vizitis ankaŭ la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kie ili faris multajn fotojn kaj kolektis dokumentojn pri Zamenhof. Pluaj detaloj pretiĝis en Bjalistoko, Varsovio kaj en aliaj polaj urboj. Sur la filmo, poste ankaŭ tra la televido estas videbla ankaŭ Ludoviko Zamenhof, nepo de la majstro. Estis eternigitaj ankaŭ la kantoj de la E-a trobadoro Andrzej Tomecki. La filmo aperos en pola kaj E-a lingvoj kaj estos aĉetebla ankaŭ de aliaj TV-stacioj.

Tri latinamerikaj studentoj kantas en Esperanto la faman „Guantanamera“



NEESPERANTISTA ORGANIZO PRETAS ADOPTI ESPERANTON

Fondita en 1970 j., la „Union des Athées“ (Unuiĝo de Ateistoj) jam nombras membrojn en pli ol 12 landoj kaj ĝia ĉijara kongreso okazos junie en Laŭzano, Svisio. Ĝis nun la franca estas la sola laborlingvo, sed la buroo, ekkonsciinte la lingvoĝenon, pretas enkonduki Esperanton en siajn internaciajn rilatojn. Se ĝi sukcesos interesigi

sufiĉe da esperantistoj, la Unuiĝo de Ateistoj povos esperantigi almenaŭ parton de sia trimestra buĝeno.

Por informoj kaj aliĝoj oni turnu sin al la prezidanto (A. Beaughon, F — 03 330 Bellenaves) aŭ al la Esperanto-komisiito (A. Knud, rue Le Poulet 22, F — 38 240 Meylan — Francio).

ESPERANTISTO — „DOKTORO DE LA TEKNIKAJ SCIENCJOJ“

D-ro Ottó Haspra — ĝis nun kandidato de la teknikaj sciencoj — ricevis la pli altan sciencan gradon de la Hungara Scienca Akademio.

Lia disertajo titolita „Teorio de la hidroelastika simileco kaj ĝia eksperimenta pruvo. Aplikado en la hidroteknika modelekspérimentado“ havis seplingvan titolpaĝon kaj resumojn en sep lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto. Inter liaj ĉ. 200 hidraŭlikaj kaj matematikaj publikaĵoj estas pli ol dek libroj kaj universitataj lerniloj. Li verkis ankaŭ popularsciencajn kaj primovadaĵajn artikolojn en Esperanto.

Dum sia studvojaĝo en 1968/69 d-ro Haspra faris grandan sciencan esplorlaboron kaj prelegis pri novaj sciencaj rezultoj ĉe pli ol dudek universitatoj en kvin kontinentoj. Li havis tempon por kontakti kun esperantistoj kaj konigi Hungaron en multaj Esperanto-kluboj de la norda kaj suda hemisferoj.

Pasintjare li prezentis prelegon ĉe la Internacia Somera Universitato de la 58-a UK de Esperanto en Beogrado.

D-ro Arpad Máthé

El „Esperanto-Magazin“, n-ro 2/1973



ESPERANTO EN KOLOMBIA UNIVERSITATO

En nia universitato (Universidad Pontificia Bolivariana) en la urbo Medellín, kiu estas la dua urbo en Kolombio kun proksimume 2 milionoj da loĝantoj, funkcias ekde 1969 oficialaj Esperanto-kursoj dank' al la apogo de la universitataj instancoj. En nia lando kaj precipe en nia urbo ekfloris tre vigla movado en la lasta tempo kun bonaj rilatoj kun la nacia gazetaro. Sed la plej grava okazaĵo estas la jena.

La Fakultato de Ĵurnalismo en nia Universitato dekretis, laŭ mia sugesto, ke la studentoj elektu el inter kvar fremdaj lingvoj la angla, la franca, la itala kaj Esperanto. Ĝis nun ili estis ekzamenataj nur en angla. Sed ekde 1974 ni instruos Esperanton kiel regulan studobjekton por la licenciaĵ kursoj.

Geesperantistoj, bonvolu sendi donace duoblaĵojn de revuoj, libroj kaj aliaj esperantaĵoj por la studentoj-esperantistoj en la Universitato da Medellín. Adreso: *Manuel Angel M., direktisto de la Lingva Fako, Poŝtkesto aera 50 179, Medellín, Kolombio.*

ESPERANTO-NOVAĴOJ EL RUMANIO

Antaŭ tri jaroj ĉe la Junulara Klubo en urbo Odorheju Sekujesk, estis fondita Esperanto-klubo, kiu tre vigle laboras. Ĝi organizis E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, ekspozicion de E-libroj, gazetoj, prospektoj kaj aliaj esperantaĵoj ricevitaĵ el la tuta mondo, aranĝis literaturajn kaj amuzprogramojn k. a.

La E-klubo solene celebris la 114-an naskiĝtagon de Zamenhof, kiun partoprenis ankaŭ la 8-jara Andrej Bilous Nagy kaj lia 5-jara fratineto Melinda — ili kantis kaj deklamis en Esperanto.

Lastatempe la esperantistoj en la urbo sukcesis fondi E-bibliotekon enkadre de la urba Kulturdomo. Tial ili petas la esperantistojn tutmonde sendi por la biblioteko librojn, broŝurojn, gazetojn, prospektojn k. s.

Adreso: *Clubul Tineretului Sculus, Esperanto-Klubo, Odorheiu Secuiesc, str. Lenin, 11, Dep. Harghita, Rumanio.*



EL DOKUMENTOJ KAJ MEMOROJ PRI LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO

En aŭgusto 1932 en Berlino sur Rosenthaler-strato kunvenis delegitoj el Germanio kaj el pluraj landoj por fondkongreso de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro). Ne komparu tiun kongreson kun la kongresoj de hodiaŭ. Tiam regis mondvasta krizo kaj do mondvasta mizero. Konsideru krome, ke tie kunvenis reprezentantoj de la **laborista** E-movado, do la plej malriĉaj inter malriĉaj. La kunvenejo estis simpla salono, kie kutime okazis dancoj, grandaj kunvenoj aŭ konferencoj. La kongresanoj loĝis gaste ĉe anoj de la berlina grupo de la Germana Laborista Esperanto-Asocio; la germanaj delegitoj ĉefe dormis sur pajo en subtegmento en la domo, kie troviĝis la sekretario de GLEA (Dirksen-strato 42). La kongreson ne patronis ŝtatestro, ne venis saluti la gastojn reprezentanto de la Berlina Magistrato, nur taĉmento de la polico, kiu severe kontrolis la dokumentojn de la danĝeraj komunist-suspektaj eksterlandanoj.

Ankaŭ alia trajto tute diferencis de kutimaj internaciaj renkontiĝoj de esperantistoj: la kongreso estis intensiva, streĉa tutsemajna laboro kun unutaga escepto — jaŭdon oni ekskursis. Ne centojn da kilometroj for per aŭtobusoj al diversaj direktoj laŭ plaĉo, sed per la subtera trajno al la urbranda Grunewald por plenigi la pulmojn per freŝa aero kaj por pli bone konatigi persone dum agrabla migrado. Jen okazis amuza „konversacio“: el la stacidomo sin verŝis amaso da homoj, inter ĝi nia grupo babilanta en Esperanto. Berlinanoj provis diveni, kiun lingvon ni uzas. Inter ili estis ankaŭ junuloj, kiuj moke kaj arogante titoligis nin laŭ nazimaniĝo, laŭ kiu ja nur germanoj estas homoj. Niaj germanaj esperantistoj memkompreneble ĉion komprenis kaj certan tempon toleris tion,

iom amuze, ĝis kiam tute subite berlinano el ni turnis sin kaj en plej originala berlina dialekto atakis: „Halt endlich deine Schnauze, sonst krichste eine in die Presse dass dir sämtliche Züge entgleisen!“ (Fine silentu, aliel vi ricevos pugnon en vian vizaĝon, ke ĉiuj viaj trajtoj (germana sinonimo por trajnoj) elreliĝos!) Vi certe povas imagi la perpleksecon kaj la ĝeneralan ridon de nia flanko.

Malgraŭ la modesteco de sia eksteraĵo la kongreso fondis unu el la plej fortaj E-organizoj. La fondo de IPE estis organizita de IUK (Internacia Unuiga Komitato). En ĝi gravan rolon ludis kaj senlace laboregis nia hungara kamarado Joĉjo Bata kun Manjo Bata. Joĉjo laboris tre racie kaj akurate, statistike notis ĉion, kio povus foje interesi. De li ankaŭ devenas la sekva statistiko, kiu aŭtentike informas nin hodiaŭ.

LA FORTOJ DE LA IPE-MOVADO

Statistiko de IUK, aŭgusto 1932

(m=membroj, g=grupoj, gz=gazeto, l=lokoj, ĉ=ĉirkaŭ)

LEA-oj ALIĜINTAJ AL IUK

Sovetio (SEU) m 6000 g 190 gz
Bulteno, *Mejdunarodny Yazyk*

Germanio (GLEA) m 4200 g 200 gz
Arbeiter Esperantist, *Esperantopioniro*
k 10 distriktoj bultenoj

Francio (FEO) m 600 g 35 gz
Proleta Esperantisto PEK-servo

Britio (BLEA) m 350 g ĉ 30 gz
Ruĝa Esperantisto PEK-cervo

Japanio (JPEU) m 350 g 100 gz
Kamarado PEK-servo

Bulgario (BULEA) m 350 g 20 gz
Mejdunaroden Ezik

Ĉinio (ĈPEU) m ĉ 150 g 3 gz
Proleta Esperantisto

Usono (ULEA) m ĉ 100 g 3 gz *Inormilo*

Belgio (BLEA) m 50 g 2 gz *Belga Esperanto-Proleto*, Service Esperanto

LANDAJ UK-oj (OPOZICIOJ)

EN REFORMISTAJ LEA-oj:

Nederlando m ĉ 100 g 4 gz *Informilo*, ABC

Norvegio m ĉ 50 g 3 gz *Proleto*

Svedio m ĉ 50 g 5 gz *Ruĝa Esperantisto*

Ĉeĥoslovakio m ĉ 50 g 5 gz *Unueco*

OPOZICIOJ SEN UK-oj (TERORLANDOJ):

Polio m ĉ 250, Hungario m ĉ 100

Unuopuloj

Litovio 12, Danio 12, Aŭstralio 13,

Novzelando 12, Sudameriko 15 (3 landoj),

Sudaŝtatio 11, Finnlando 11, Jugoslavio 13, Italio 11, Rumanio 12.

SIMPATIAJ LEA-oj

Hispanio, Portugalio (PUH) m ĉ 200 g 2 gz *Proleta Voĉo*

Estonio (ELEA) m ĉ 50 g 2 gz *Onto*

Latvio (Rig LES) m ĉ 50 g 1

EKSTER NIAJ VICOJ

(REFORMISTAJ ORGANIZOJ)

Nederlando (NEFL) m 1700 g 55 gz *Laborista Esperantisto*

Aŭstrio (ALLE) m 1000 g 60 gz *Socialisto*

Germanio (SEA) m 1000 g 80 gz *Amikecon*

Svedio (SLEA) m 450 gz *Proleta Esperantisto*

Norvegio (NLEA) m ĉ 150 g 10

En SAT ne LEA-oj ĉ 500 SAT-grupoj, sendependaj ĉ 30

Do al IPE-movado apartenas 9 LEA-oj m 12000, 4 UKoj m 250, du opozicioj m 350, unuopuloj m ĉ 100, simpatiantaj LEA-oj m 300.

Entute amikas 13000 m. (72%) 600 lokaj grupoj en 18 landoj kun 33 gazonoj (82%). Sub reformista influo 5000 m (28%) en 300 lokaj grupoj en 8 landoj kun 7 (18%).

La centra organo de IPE estis „INTERNACIISTO“. Ĝi estis eldonata en Berlino, kie ankaŭ troviĝis la sekretario de IPE. Certe tio estis unu el la kaŭzoj de la profunda krizo de IPE, kiam en januaro 1933 la faŝismo dro-nigis ĉiun progreseman agadon en Germanio. El „Internaciisto“ fariĝis „Sur posteno“. Okazis poste ankoraŭ du konferencoj de IPE, en julio 1934 en Lille, Francio, kaj en 1937 en Parizo. Tria konferenco estis planita por Parizo en 1939, sed se mi bone memoras, ĝi ne okazis. Jam en Lille plej grava temo estis, ĉu daŭrigi la agadon de IPE aŭ ne. La sovetian SEU prezentis la fama sovetia verkisto Iljin. Plej fervora pledanto por restabiligo de la organizo estis nia nelacigebla, simpatia franca kamarado Marcel Boubou (Marsel Bubū). Ĝuste li en 1939 j. ebligis la reeldonon de „Internaciisto“, de kies nova serio aperis tri numeroj. La Dua Mondmilito ĉesigis ĉiun pluan internacian agadon. Kamarado Boubou ne senfare rigardis la invadon de germanaj faŝistoj en Francion. Tion pravas ke li, kamarado Marcel Bourgnon (Burjnjon), instruisto kiel Marcel Boubou, k. a. estis murditaj en faŝista koncentrejo Dachau (Dahau). Kiel kamarado Jean Lezan (en „Paco“ 1970, 9—10) mi demandas: ĉu ne troviĝas kamarado de Orleāns, kiu scias verki artikolon pri Marcel Boubou, certe unu el niaj plej noblaj pioniroj?

La politika situacio post la Dua Mondmilito ne plu estis tiu de la jaroj ĝis la milito. Milionoj da homoj, kiuj antaŭe ne atentis la avertojn, ke faŝismo signifas militon, spertis tion, kaj hodiaŭ la movado kontraŭ faŝismo kaj por paco ĉirkaŭas homojn el plej diversaj sociaj tavoloj kaj mondkoncep-toj. Ankaŭ la pacamaj esperantistoj konsciigis pri tio kaj kolektigis en la pacmovado per siaj propraj rimedoj. Retrorigardo en la historio de la laborista E-movado certe utilas. Same kiel Marcel Boubou ni luktis senlace por

Okaze de la nunjara centa datreveno de la naskiĝo de Henri Barbusse ni, esperantistoj, devas aparte memori pri li. Li ja estis ne nur mondfama verkisto, kies verkaĵoj faris grandan efikon, ne nur arda socialisto kaj poste komunisto, sed ankaŭ — simile al sia amiko Romain Rolland — konvinkita pledanto por Esperanto. Tio ne estas mirinda, li ja agis — ankaŭ per siaj verkoj, el kiuj la plej konata estas „La Fajro“ — kontraŭ la milito kaj hombuĉado, por vera homa paco inter la popoloj.

Gorkij — alia serioza adepto de Esperanto — skribis pri „La Fajro“: „Tiu ĉi libro estas simpla kiel evangelio; plena da profeta kolero; la unua tia libro, kiu pri la milito parolas plej simple, plej peze, plej trankvile, kun la nevenkebla forto de la realo.“ En lia verko francaj lingvistoj, kiel Marcel Cohen, trovis la lingvon de la popolo.

Admire skribis pri lia verko Stefan Zweig, komparante ĝin kun aliaj kontraŭmilitaj romanoj. „En ĝi la kontemplanter ĝin kun aliaj kontraŭmilitaj romanoj. „En ĝi la kontemplanta Ego dekobliĝas en nova unueco“. Vere en ĝi „la soldatoj atingas la pinton de la vekigo al konscio“. Prave ĝi meritis la Goncourt-premion. En lia alia romano posta „La Lumo“ eksonas la kontraŭmilita krio de la ribeliĝinta konscio kaj Barbusse mem tiel skribis: „la homo serĉas la veron kaj la espe-

ron“. Li kreis la Lumo-rondojn por kunigi la intelektulojn disvastigante la ideon de socio konstruota sur egaleco kaj justeco.

Barbusse konigis en revuoj la revolucion literaturon de diversaj landoj. Li skribis libron pri Zola kaj liaj artikoloj pri la proleta literaturo multon alportis al klarigo de la demandoj koncerne la socialisman realisman literaturon.

Li senĉese klopodis kunigi per komuna laboro ĉiujn demokratiajn kaj humanistajn fortojn.

Konata hungara literaturisto prave deklaris en sia memorskribo en 1935: „Barbusse estis vere la homo de la veroj. De la veroj, kiuj alvenas; li estis batalanto kaj pioniro de la nova homaro, kiu naskiĝas el unuiĝo de laboristoj kaj intelektuloj. Kaj Barbusse, la verkisto kaj la artisto, mem vivis en la medio de laborantoj“. La nuna literaturisto Béla Köpeczi aldonis: „Barbusse estas pli granda kaj pli moderna verkisto, ol multaj imagas, kaj pli profunda, pli elprovita pensulo, ol estis multaj samtempuloj eble pli spertaj en filozofio“. Estas memkompreneble, ke tia vera homarano arde kaj tre serioze rekomendis Esperanton. Ni finu per lia grava deklaro: „Ni, socialistoj, devas ambaŭmane ekpreni tiun ĉi mirindan slosilon, kiu malfermas antaŭ ĉiuj la tutan mondon. Tiu ĉi ŝlosilo estas Esperanto, en kiu enestas ĉiu bona kvalito“.

Ankaŭ hodiaŭ la homaro kaj precipe ni devas studi kaj sekvi liajn ideojn kaj instruojn.

Paŭlo Balkányi
El „Paco“, n-ro 6/1973

paco en Proksima Oriento laŭ la rezolucio de UNO, por la suvereneco de ĉiuj popoloj en Afriko, kontraŭ la kolonistoj de Portugalio kaj la neokolonistoj de FRG, Britio kaj Usono, por ke fine ĉie regu paco kaj ebleco por ĉiu popolo evolui senĝene!

Ludwig Schödl
El „PACO“ № 4/1973

En 1933 per la tiama Radio Sofio mi faris dekdu prelegojn pri la problemo de internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto. La temoj, krom la ĝeneralaj demandoj pri neceso kaj utilo de unu komuna internacia lingvo, estis ankaŭ la jam efektivigita elprovo de Esperanto per aplikado en diversaj sferoj de la vivo. Unu prelego estis dediĉita al ĝiaj lingvaj kvalitoj. Mi tuis, nature, ankaŭ la belsonecon de la lingvo. Sciante la dubojn kaj la malkredemon, kun kiuj multaj aŭskultantoj renkontos miajn asertojn, mi rakontis okazon el mia persona agado. La saman ĉkazon mi nun deziras rakonti al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“.

En la jaroj de mia studenteco foje mi disputis kun obstina oponento, kiu alpaŝis al la demando kun nevenkebla antaŭjuĝo, neis ĝenerale la eblecon krei laŭ racia vojo taŭgan lingvon kaj malagnoskis ĉiujn pozitivajn kvalitojn de Esperanto — ne konante ja ĝin. Li estis jam aŭdinta kelkajn Esperantajn vortojn kaj, kiel ofte okazas, penis elparoli ilin intence en kripligita formo por ridindigi la lingvon. Mi kontraŭdiris, ke per tia kripligo li nur povas komprenigi, ke se oni elparolas ne laŭ tia maniero, sed korekte la lingvon, la impresoj ne estus tia, kian li deziras vekti; se li aŭdus bone prononcatan Esperanton, li eble ŝanĝus sian opinion. Li obstinis. Tiam, por apogi mian aserton, mi diris al li, ke mi ilustras mian tezon per ekzemplo: mi citos al li la komencajn versojn de „Eneido“ de Vergilio en Esperanta traduko. Kaj mi komencis:

Arma virumque cano Troiae qui primus
ab oris
Italiam fato profugus, Laviniaque venit
litora. . .

La latinan lingvon li ne konis kaj facile ekkredis, ke la citaĵo estas en Esperanto. Li tuj trovis sufiĉe fortajn esprimojn por sakri tiun ĉi „malbelan

lingvaĉon“, kiu sonas tiel terure barbare.

— Se tamen vi tiel rapide pritaksas, certe vi trovos ankaŭ la latinan originalon malbelan — mi rediris. — Jen, aŭdu ĝin:

Armojn mi kantas kaj viron, unua el
bordo Trojanaj,
kiu alvenis, fatale puŝita, kaj ĝis Lavinujo,
lando Itala...

Sed nun li estis ravita:

— Jen, tio estas lingvo! Kiel bele, kiel noble ĝi sonas!... Kaj kiel estis en la traduko?

Mi ripetis:

Arma virumque cano. . .

Sekvis nova torrento de mallaŭdoj, sakroj, humiligaj epitetoj. Li petis, ke mi donu al li la ĝuon aŭdi denove la „originalon“. Kaj mi komencis:

Armojn mi kantas kaj viron. . .

Ondo de laŭdoj.

Apenaŭ nun mi klarigis al li, ke tio ĉi, kion li laŭdegas, estas la Esperanta traduko, kaj tio, kion li trovis terure malbela, fakte estas la latina originalo. . .

Lastatempe mi havis okazon legi pri sama maniero, kiun uzis nia granda poeto Antoni Grabowski ĉe preskaŭ samaj cirkostancoj. En „Paco“ n-ro 4 de 1971 (p. 19) estis lokita sub titolo „Anekdotoj el la esperantista vivo“ la sekvanta artikolo.

Antoni Grabowski tre ŝatis deklami, li povis tion kun kortuŝo kaj tre bele. Iun vesperon en familio la dommastro — no diris al li:

— Antoni, bonvolu deklami ion en via fama Esperanto, vi ĉiam parolas pri ĝi, sed neniam per ĝi.

Antoni deklamis.

Kiam li finis, ĉiuj diris:

— Sed ĝi ja estas neimageble malbelsona, via lingvaĉo. Kompreneble, estas tia miksaĵo!

* **Eneido**, trad. de d-ro Vallienne, Paris 1907, Hachette & Co.

— Nu, kiu povis esperi ion alian?
— Mi petas pardonon, — diris Grabowski, — Esperanto ne estas kulpa. Mi deklamis al vi itale verkon de Petrarco. . .

Kaj li eltiris la verkon el sia poŝo kaj montris ĝin al la konsternita ĉeestantaro.

Aliffoje multaj verkistoj kunvenis la kafejon kaj atakis lin pri Esperanto. Oni ree petis, ke li deklamu ion. Ĉiuj aŭskultis, ŝerce kapsignante unu al la alia. Kiam li finis, la kritikoj estis malbonaj: stultaĵo, frenezaĵo, verko de malsana cerbo.

NI REGENZAS

„ESPERANTO KEELE OPIK“ de J. OJALO — grava sukceso por la estona Esperanto-movado

La lastan tempon en niaj E-medioj regas du dangeŝraj tendencoj:

1. Ke Esperanto estas malfacila lingvo. Eŝ aŭtoritataj personoj en la pedagogia kampo asertas tion kaj tiamaniere armigas sin per argumentoj eldoni multpaĝajn, brikoformajn E-lernolibrojn. En tiuj volumoj abundas superfluaĵoj. Krom tio, ekzistas Esperantaj gramatikoj pli dikaj ol tiu de „Lingua latina“. Kaj la opinio pri la facileco de la lingvo fariĝas falsa legendo. La grandeco de la lernolibra materialo vekas veran timon ĉe la simpatiantoj de nia lingvo. Anstataŭ gajni ilin kiel adeptojn, oni forpuŝas ilin. Tiu cirkonstanco efikas kontraŭpropagande. Ĝi malutilas al nia movado.

2. La dua tendenco, ke „Esperanto estas tre facila lingvo“, estas narkoto por naivaj optimistoj. Multaj el ili lernas ĝin iel neglekte, kiam espero, ke la lingvo mem enpenetros iliajn kapojn. Posttempe iuj malreviĝas, aliaj restas eternaj komencantoj.

Kie do troviĝas la vero? Sendube, ie en la mezo. Fakte Esperanto estas facila lingvo, kiun oni ekposedas relative rapide helpe de sistema lernado, ekzercado kaj praktikado. Ni ne forgesu la proverbon „Ne gutas mielo el la ĉielo!“.

Alie staras la demando, kia devas esti la Esperanta lernolibro.

La plej ekzaktan respondon donas la estona esperantisto el Tallinn Jaan Ojalo, aŭtoro de la modela E-lernolibro „Esperanto keele opik“.

Antaŭ ni estas beleĝa eldonaĵo de „Valgus“

— Indulgu, sinjoroj, — diris Grabowski, — Esperanto estas senkulpa. Mi deklamis fragmenton el „Mirejo“ de Mistral, en provenca lingvo. . .

Iu petis daŭrigi. . . Alia diris, ke li ne aŭskultas bone. Do, Grabowski daŭrigis, ĉiuj atente aŭskultis. Poste diris tiu, kiu petis lin:

— Tio estas karakterhava lingvo, oni tuj sentas pralingvon. La sonoreco de la latinidaj lingvoj estas senkompara!

— Mi devas ree peti pardonon! Ĝi estas la sekvo de la unua parto, sed ĉi-foje ĝi estas la Esperanta traduko! — rediris Grabowski.

ADA

Tallinn, 1973, 136-paĝa, formato 12, 05/20 cm, poligrafie senriproĉa, belarte prizorgita.

La aŭtoro estas fervora longjara esperantisto, E-kursgvidanto, bibliografo kaj librokollektanto, iama partoprenanto en Esperanta literaturo rondo, en kiu registris sin kiel poeton kaj tradukanton. Kiel kreanto de lernolibro li montras kvalitojn de noviganto. Ojalo malagnoskas la dogmojn de iuj trolaŭdataj E-pedagogoj, kiuj asertas, ke en ĉiu nova leciono oni ne devas doni pli ol 7 vortojn. En la unua leciono de sia lernolibro Ojalo donas 8 vortojn, en la dua — 33, en la tria — 40 ktp. Kial ne? Oni ne povas praktiki lingvon sen vortoj. Mastri bone la lingvon — tio signifas, ke oni devas disponigi pri sufiĉe riĉa vortrezoro.

En la 3-a leciono Ojalo jam konigas al la kursanoj la akuzativon. La ekzercoj estas logikaj. La dialogoj — viglaj kaj interesaj. La fabeloj — belenhavaj. Ili malkovras la spiritantan trezorejon de la estona folkloro. Bonhumoraj koncizaj anekdotoj kontribuas por gaja atmosfero. Tradukaĵoj de H. Dresen, E. Linnuse kaj J. Ojalo, originalaj versaĵoj de L. Jevsejeva, H. Adamson k. a. variigas la enhavon de tiu E-lernolibro. La lingvaĵo estas glata kaj facilflua. Oni povas legi ĝin kiel belartan verkon.

Dudekdu lecionoj, kontrola ekzercaro, konciza legaĵaro, negranda vortaro — jen ĉio.

Generale la lernolibro estas tute nuntempa kaj respondas al la aktualaj pedagogiaj postuloj.

La aŭtoro solvis gravan problemon: per nemulta da rimedoj li sukcesis realigi multon!

Lia ekzemplo estas imitinda por ĉiuj kompilantoj de E-lernolibroj.

Prodan Prodanov

Jam antaŭ tri jaroj mi skribis artikolon por „Bulgara Esperantisto” pri mia vizito en Sofio. Ĉi-jare mi denove vizitis tiun belan urbon kaj renkontis miajn bonajn amikojn, inter kiuj denove mi havis honoron paroli kun s-ano Nikola Aleksiev kaj, kompreneble, kun la prezidanto de nia ĝemela E-Societo „Maksim Gorkij” s-ano Nano Nanov. Mi havis okazon dum mia vojaĝo denove viziti la ĉefurbon de frata Rumanujo — Bukureŝton, kaj kiam mi partoprenis porpakan kunvenon en Sofio, mi estis komisiita saluti tiun kunvenon ne nur en la nomo de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, sed ankaŭ en la nomo de la rumanaĵaj esperantistoj. La porpaca kunveno, organizita de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto de Bulgarujo, la Packomitato de Sofio kaj, kompreneble, de Bulgara E-Asocio, estis por mi granda travivaĝo. Mi povis paroli antaŭ precipe neesperantista publiko kaj ni uzis Esperanton kiel lingvon de la paco. Dum la kunveno parolis kaj japano, kaj vjetnamo, kaj portugalo kaj ĉiuj en unu lingvo — la lingvo de la paco, la lingvo Esperanto. Tio estis grandega propagando de Esperanto. Ni pri Esperanto eĉ

ne parolis, sed nur pri la paco.

Jes, Esperanto estas lingvo de la paco, kiel ankaŭ diris al mi post la kunveno mia frato, kiu kun mi vizitis Sofion kaj partoprenis la kunvenon. Tiam ti ankoraŭ ne estis esperantisto, sed decidis tuj lerni ĝin.

Mi volas denove danki al s-anoj Nikola Aleksiev, Nano Nanov, Iliev, s-anino Vera Văjarova kaj al ĉiuj aliaj, kiuj faris ĉion por mi kaj por mia frato, ke ni sentu nin en Sofio kiel hejme. Jes, ili sukcesis, kaj mi nun ĉiam diras, ke mia dua hejmo estas ĉe miaj bulgaraj geamikoj.

Mi jam nun esperas, ke baldaŭ ni povos renkonti niajn amikojn el Sofio en nia urbo Liberec, kaj ni faros ĉion, ke ili sentu sin kiel hejme.

Ladislav Špina,
sekretario de E-Klubo en
Liberec — Ĉeĥoslovakio

** En julio 1973, kiam okazis la granda packunveno en Sofio, pri kiu s-ano Špina plue parolas (vido n-ro 9/1973 de „BE”).*

Novaĵoj de Unesco Features kaj Informa servo de UEA

UNESKO KAJ LA ANALFABETISMO

Unu el ĉiuj tri plenkreskuloj en la mondo estas analfabeto. Kaj kreskas la nombro de tiuj, kiuj povas nek skribi. Ĉi tiun danĝeran situacion priskribis s-ro René Maheu, ĝenerala direktoro de Unesco, kiam en Nova Delhio li disdonis la ĉefajn internaciajn premiojn por agado kontraŭ analfabetismo en la Internacia Tago de Legokapablo, t. e. la 8-an de septembro 1973.

S-ro Maheu diris, ke inter 1950 kaj 1970 proporcio de la analfabeta loĝantaro de la mondo malpliigis de 35% ĝis 34%; sed, ĉar la tuta loĝantaro plimultiĝis, la efektiva nombro de analfabetoj altiĝis de 700 000 000 ĝis 783 000 000. La plej optimismaj prognozoj de statistikistoj antaŭvidas malpliigon de la procento de analfabetoj ĝis 15 el cent de la monda loĝantaro plenkreska antaŭ la fino de la nuna jarcento. Tio signifus, ke estos 650 000 000 da analfabetoj en la jaro 2000 — cifero tute ne akceptinda.

La alvokon al internacia agado ripetis la ĝenerala sekretario de UN, d-ro Kurt Waldheim, en mesaĝo por la Internacia Tago de Legokapablo. Li certigis, ke la celon forigi la analfabetecon oni povos atingi „nur per programoj de internacia kunagado, ĉar diversaj nacioj kun plej gravaj problemoj ne posedas ja rimedojn necesajn por ilia solvo”.

KOMUNA LINGVO POR ORIENTA AFRIKO

Eminentaj edikistoj el Tanzanio, Kenjo kaj Ugando kunlaboros kun registaraj kaj aliaj instancoj por pliiĝi la jam kreskantan uzon de la lingvo svahilo kiel komuna lingvo tra la tuta Orienta Afriko. Bazajn studojn, evoluigon de uniformaj ortografio, gramatiko, prononco kaj vortprovizo prizorgos la Interuniversitata Konsilio de Orienta Afriko, kiu provizos ankaŭ la eblecojn instrui svahilon je la nivelo de la pli alta eduko. Laŭ la Internacia Instituto por Studoj pri Eduko, en Bruselo, la uzo de svahilo rapide kreskis dum la pasintaj dek jaroj.

POŝTMARKOJ PRI HOMAJ RAJTOJ

La Poŝta administracio de UN eldonis la 6-an de decembro specialan poŝtmarkon por festi la dudekkvinan datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Tiun deklaron, kiun oni konceptis kiel „komunan normon atingendan de ĉiuj popoloj kaj nacioj”, adoptis la Ĝenerala Asembleo de UN la 10-an de decembro 1948.

Francio eldonis specialan poŝtmarkon pro la datreveno.

F A B E L E T O

de Ljuba Bojaĝieva

En arbaro densa, foli plena
je la horo bona, frumatena,
renkontiĝis foje du formikoj,
bonaj kaj fidelaj du amikoj.
Unu portis grajnon de tritiko,
sekalgrajnon — la dua formiko.

— Ho, saluton! — diris la unua.
— Estu sana! — respondis la dua. —

Kien tiel vikle, frumatene
vi transportas tiun ŝarĝon pene?

— Mi rapidas porti ĉi donacon
al patrino en formikpalaco.
Kaj vi, kara, kien vi rapidas?
Por ripozi kial vi ne sidas? —
ekdemandis plue la formiko,
kiu portis grajnon de tritiko.

— Sekalgrajnon portas mi al paĉjo,
por ke manĝu li laŭ sia plaĉo.

La vojeto en l' arbar' sovaĝa
estis tamen kruta kaj mallarĝa.
Kun la ŝarĝ' renkonte preterpasi
ja ne eblis eĉ se sin frakasi.
Tutan tagon tiris la unua,
puŝis same kun fervor' la dua. . .
Dume jam la suno malaperis,
la stelaro sur ĉiel' aperis,
kaj ekflustris la vesperaj blovoj. . .
Lacaj, ŝvitaj pro la streĉaj provoj,
la formikoj ĉe la fin' komprenis,
ke pri l' grajnoj ili vane penis.

— Ni laciĝis — diris sur la pado
la pli aĝa, saĝa kamarado, —
grajnojn ni transporti ne sukcesis!

— Ne sukcesis, — la alia jesis.
— Tial mi al vi proponus jene:
la donacojn portu ni senpene —
vi la vian al patrino mia,
kaj la mian mi — al paĉjo via.

Proponite — sekve plenumite.
Ĉiu el la saĝaj du formikoj,
laŭ returna vojo direktiĝis.
Kaj per tio la fabel' finiĝis.

PROVERBOJ

Kiu volas, tiu povas.
Neniu komenco estas facila.
Kia la semo — tia la frukto.
Kio iras el la koro, tio venas al la koro.

NI INVITAS AL PARTOPRENO
EN GRANDA INFAN-KONKURSO

La Vojevodja Kultur-Domo en Bydgoszcz — Pollando, organizas konkurson pri infana kreado — desegnado, grafikarto, pentrado kaj arta eltondado. La konkurson povas partopreni infanoj en la aĝo de 5 ĝis 13 jaroj. La alsendotaj laboraĵoj — en la kvanto de 1 ĝis 3 — povas trakti diversajn problemojn ligitajn kun la nuntempa Pollando, ekz. industrio, pejzaĝo, kulturo, grandaj poloj k. a.

La alsendotaj laboraĵoj devas enspaciĝi en la dimensio de 50×70 centimetroj. Sur la inversa flanko de la konkursa laboraĵo oni devas skribi la antaŭnomon kaj nomon de la aŭtoro, la aĝon kaj la adreson.

Sendepe de la atribuitaj premioj, ĉiu partoprenanto ricevos konkursan memor-plakajeton. La premiitaj konkursaĵoj estos elmontritaj en speciala ekspozicio, aranĝota en Bydgoszcz en julio 1974 j.

Kaj nun — Atenton! La ĉefa premio en la konkurso estas 10-taga restado en Pollando por la venkinto kaj ties protektanto (kune kun la pagitaj vojaĝkostoj). Krom tio, la ĵurio aljuĝos entute 200 premiojn por la plej bonaj laboraĵoj en ĉiu grupo de la aĝo kaj tekniko de la plenumo.

Ĉiuj alsendotaj laboraĵoj fariĝos proprajo de Galeria i Ośrodek Twórczości Plastycznej Dziecka — Galerio kaj Centrejo de la Plastika Kreado de la Infano en Toruń, la naskiĝurbo de la granda pola astronomo Mikolaj Kopernik.

La konkursaĵojn oni devas alsendi ĝis la 31 de majo 1974 al la adreso: Wojewódzki Dom Kultury, Bydgoszcz 85-023, ul. Torunska 30, Pollando.

Korektu gravajn erarojn en n-ro 7-8/1973: en la versaĵo „Grava demando“, linio 5-a, devas esti „tertremo“ (ne „tertrema“); linio 6-a devas esti „kuvon“ (ne „nudo“).

Krome: s-ino Jevsejeva estas latvino (ne litovano).

Ni petas pardonon pri tiuj ĉi eraroj!

SUR ALIA PLANEDO*

Nia spaco-ŝipo atingis nekonatajn planedojn. Mi *elsipiĝis* kaj komencis esplori ĝin. Kaj subite mi troviĝis antaŭ unu el la homoj, kiuj loĝas sur tiu nekonata planedo. La *ulo* estis egala al ni, sed tute senhara. Lia kranio aspektis kiel polurita ovo de struto. Mi faris *amikecan* geston al la senharulo kaj diris:

— Mi venas de la Tero, de mondo, kiu troviĝas je tiu direkto. Mi estas amiko.

— Ĉu? — demandis la *aliplanedano*.

— Jes! Amiko! Ni, teranoj, estas egalaj al vi, kiel vi mem povas konstati, observante min.


— Ĉu? — li rediris.

— Egalaj al vi. Sed ni havas sur la kapo tion, kion ni nomas haroj, ĉu vi vidas? — Kaj mi *mantuŝis* mian densan hararon.

— Haroj, ĉu ne? — diris la *ulo*.

— Jes, haroj. Ili kreskas sur la kranio. Ni ne estas kiel vi tute senharaĵ.

Kaj tiam, subite, la kalvulo sin ĵetis sur min. Per piedoj kaj pugnoj li terure batis min. Post tio li foriris, flustrante:



— Kia malrespekto! Ĉu ne sufiĉas, ke oni mokas al mi sur ĉi tiu planedo, ĉar mi estas senhara? Nun alvenas eksterplanedano por ridindigi min!

Ergoto de Bonaero

(En „*Esperanto*“, n-ro 10/1971)

Klarigoj:

el-ŝip-iĝ-is: iĝi el la ŝipo; forlasi la ŝipon (Komparu: enŝipiĝi=iri en la ŝipon).

ul-o; la sufikso *ul*, uzata memstare, indikas individuon, sen difini specialajn ecojn. (Ulo, uzate sola, ne havas tre flatan signifon.)

amik-ec-a: tie ĉi temas pri gesto de amikeco kaj ne gesto de amiko, ĉar la du viroj ankoraŭ ne estis amikoj.

ali-planed-an-o: ano (loĝanto) de alia planedo (Komparu: teranoj=anoj (loĝantoj) de la Tero, alinacianoj=anoj de alia (j) nacio (j), samurbanoj=anoj de la sama urbo).

man-tu-ŝis: tuŝi per la mano (Komparu: kapjesi=diri „jes“ per movo de la kapo; kapnei=diri „ne“ per la kapo; piediri=iri per la piedoj).

* Ekde nun „*Bulgara Esperantisto*“ disponigos al siaj legantoj iujn el la materialoj, kiuj aperis en revuo „*Esperanto*“ de UEA — en la rubriko „*Komenco bona — ĉio bona*“, redaktita de E. L. M. Wensing. Ĉi tiuj materialoj estas aparte utilaj por novaj esperantistoj.

KRUCVORTENIGMO

Horizontale: 1. Konifera arbo (adjektivo). 2. Malplezuri pro senintereso pri io (adverbo). 6. Linio, kiu pense ligas la polusojn de la terglobo. 8. Du egalaj literoj. 9. Prepozicio. 10. Trinkajo. 11. Rompitaĵoj. 13. Pagi anticipe por ricevi gazeton.

Vertikale: 1. Mezuri la pezon de objekto (radiko). 2. Sufikso. 3. Adverbo. 4. Sen kio oni ne povas vivi. 6. La samo (adjektivo). 7. Politika, kultura aŭ sporta societo. 10. Muzika sono. 12. Prefikso.

KONSTANTA E-RUBRIKO EN ĴURNALO

La redakcio de ĵurnalo „*Oteĉestven Zov*“ — urbo Vraca, kiu tre pozitive taksas la noblan agadon de la esperantistoj, delonge publikigas E-materialojn. Nun ĝi akceptis la proponon aperigi konstantan ĉiumonatan rubrikon sub titolo „*Esperanto — lingvo de la amikeco*“.

La rubriko komenciĝis je la 14 de decembro 1973. En la enkondukaj vortoj al ĝi oni interalie



dis: „Esperanto ĉiam servis al la nobla ideo proksimigi la homojn el la tuta terglobo. La ideo mem krei internacian lingvon havas en si ion noblan, homaman kaj progresaman. Hodiaŭ ni des pli multe konvinkigas, ke Esperanto povas ludi gravan rolon por evoluigi interkomprenigon kaj amikecon inter la popoloj, por firmigi la pacon en la mondo.“

En la rubriko estas publikita artikolo de Bojĉo Mladenov — E-instruisto kaj gvidanto de la lernantoj-esperantistoj en gimnazio

„Ĥristo Botev“ — Vraca, sub titolo „Verda Raketo hodiaŭ kaj morgaŭ“. Mladenov substrekas kelkajn notindajn atingojn de la unua en nia lando lernejana E-societo „Verda Raketo“ lige kun 12 jaroj de ĝia ekzisto. Dum tiu ĉi periodo ĉirkaŭ 1000 gelnantoj el la gimnazio estis membroj de tiu societo. Ekde 1954 j. Esperanto estas instruata fakultative en la gimnazio. Dum la kuranta lernojaro la nombro de la E-lernantoj estas 160.

TRA LA GAZETARO

En j. „Septembro“ — u. Bjala (16. VII. 1973) — intervjuo de Ivan Kolarov kun Simeon Baltaĝiev sub titolo „Kulturaj agantoj — ordenportantoj“. S-ano Baltaĝiev estas dekorita per la alta ordeno „Kiril kaj Metodij“ pro sia longjara agado sur la kampo de kulturo, teatro, kiel kunlaboranto de multaj ĵurnaloj, gazetoj k. a. Li estas longjara prezidanto de E-Societo „Paco“ en Bjala.

En la sama ĵurnalo (16. XII. 73) — artikolo de Sim. Baltaĝiev „La internacia lingvo Esperanto kaj ĝia kreinto d-ro L. L. Zamenhof“.

En j. „*Pravna Tribuna*“ — organo de la Societo de Juristoj en Sofio (12. XI. 73) — raporto „Vigla agado de la juristoj-esperantistoj“ — pri la aktivecoj de la juristoj enkadre de la 58-a UK de Esperanto en Beograd.

En la sama ĵurnalo (26. XII. 73) — informo pri kurso de Esperanto, funkcianta en la Justicpalaco en Sofio kun gvidanto Violin Oljanov (kun foto de la kursanoj).

En j. „*Srednoškolsko Zname*“ — Sofio (20. XI. 73) — raporto de Paulina Nečeva pri la Unua Nacia Konferenco de Lernantoj Esperantistoj.

En j. „*Trojanski Glas*“ (21. XI. 73) — granda artikolo de Vasil Mitovski sub titolo „Esperanto en Trojan“ — lige kun la 70-jariĝo de la E-societo en la urbo.

En la sama ĵurnalo — „Letero al la redakcio“ de Minko Iv. Conkovski, naskiĝinto en Trojan, nun loĝanto en Sofio, en kiu li ĝustigas faktojn pri la partopreno de esperantistoj el Trojan en la Septembra Ribelo de 1923 j.

En j. „*Zname na komunizma*“ — u. Loveĉ (27. XI. 73) — informo de Totjo Enev pri la celebrego de la 70-jara jubileo de E-Societo

„Balkana Selo“ en u. Trojan.

En j. „*Septemvrijsko Zname*“ — u. Pazarĝik — informo pri la konstruado de propra Esperanto-domo en la urbo.

En la sama ĵurnalo (27. XII. 73) — informo pri plenkunsido de la Distrikta Komitato de BEA en Pazarĝik.

En j. „*Rabotniĉesko Delo*“ (18. XII. 73) — informo pri la plenkunsido de CK de BEA, kiu pridiskutis la agadon dum 1973 j. kaj la taskojn por 1974. La plenkunsido akcentis deklaron kontraŭ la teroro de la militista hundo en Ĉilio kaj por paco en proksima Oriento sub la egido de UNO.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario



Ganĉo Ivanov — str. Hr. Kârpaĉev 49, Loveĉ. (26-jara — kun ĉl pri ĉt).

Vasil Konov Vasilev — str. Nikola Iliev 35-a, Loveĉ (kun ĉl — dez. korespondi kaj interŝangi insignojn, bk).

Diana Dakova (sur la foto) — str. Hr. Botev 21-a, Loveĉ (lernantino de XI kla-

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV, Stefka ĤRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

so — dez. kor. en Esperanto, rusa, germana kaj anĝla lingvoj).

28 gelnantoj 13—14-jaraj dez. korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo pri ĉi kaj intersanĝi lernomaterialojn, bk, pm. Adreso: Esperanto-Klubo ĉe Unua Fundamenta Lernejo (1 osnovno učilište) — *Velinograd*.

Ĉeĥoslovakio

Hladik Miroslav — 46 002, *Liberec*, Chrástavská 18 (43-jara radio-redaktoro — pri muziko, arto, foto k. a.).

Houfek Jaroslav — 54 473 *Trěbnoš* 65, o. Trutnov (35-jara magazenisito — pri geografia, bk.).

Chladek Antonin — 43 111, *Jirkov*, Konevova 1171 (33-jara inĝeniero — pri radiotekniko, fotoj, sporto).

Jankolova Fana — 2801 *Trstena*, ul. Dukelských hrdinů 349 (18-jara studentino — pri muziko, sporto).

Jarolim Jiří — 73 922 *Stara Bela* 686, (45-jara bestkuracisto — pri bestkuracado).

Junglingova Helena — 77 000 *Olomouc*, tř. svornosti 38 (55-jara teknikistino — pri lingvoj, vojaĝoj, pupoj).

Jirak Tomáš — 25 166 *Senohraby* 178 (14-jara lernanto — pri astronomio, fotoj).

Krahulíkova Marie — 12 000 *Praha* 2, nam. Krale Jiriho 5 (26-jara artoendistino — literaturo, vojaĝoj, numizmatiko, filmoj, bk).

Krupkova Alena — 36 004 *Karlovy Vary*, Bohatice 5 (40-jara higienistino — pri nutrado, literaturo, vojaĝoj).

Kupsa Borivoj — 68 001 *Boskovice*, Bezručova 2 (18-jara studento — pri arto, skulptado, ĉi).

Svobodova Jana — 26 601 *Tetin-Koda*, p. Beřoun (20-jara vendistino — muziko, bk).

Jugoslavio

La jugoslovakia magazeno por knabinoj TINA (aperas ĉiusemajne, eldonkvanto 100 000 ekz.) publikigas E-kurson por siaj legantinoj — 12—17-jaraj. Ili deziras korespondi. Skribu al: Esperantistina kurso — Ju 41 000 *Zagreb*, Ljubice Gerovac 1,

Pollando

Kazimierz Piwon — *Misdrylesie*, str. Powstańców, Slonskich 11, pow. Bystrzyca KT (27-jara — kun ĉi pri literaturo, mod. muziko, kino, teatro, intersanĝas bk, mod. revuojn).

diapozitivajn, gram. diskojn, alumentikedojn ktp).

Elżbieta Sulima — 19 300 *Elż*, skr. poczt. 81.

Alina Blaszcak — 62 405, woj. Poznań (22-jara fotografino — kun gebulgarioj pri teatro, kino, pentroarto, literaturo, mod. muziko, fotoj, turismo, gram. diskoj k. a.).

Jadwiga Wilczko — ul. Mickiewicza 72 m. 1, *Białystok* (19-jara — pri filmoj kaj turismo).

Włodzimierz Malinowski — ul. Tuwina 28/2, 59 902 *Zgorzelica* *Prato* 2.

Sovetunio

20 knaboj kaj 10 knabinoj — ĉiuj 16-jaraj, novaj esperantistoj el fervoja mezlernejo, dez. korespondi kun bulgaraj gelnantoj. Granda parto de ili dez. korespondi ankaŭ kun rumana kaj jugoslavaj esperantistoj. Skribu al ilia E-gvidantino: Anja Vojnaroviĉ — Esperanto, PTU — 43, 343 871, *Avdeevka*, Doneckaja oblastj.

J. J. Dokukin — 353 908 *Novorossijsk* 8, Anapskoje ŝose 41 — A, kv. 16 (intersanĝas monerojn, numizmatikajn katalogojn, bk — respondo certa).

Vida Kupuste — 235 242 *Kapčunai*, reg. Pasvalio, Litovio (18-jara abiturientino — kun ĉi pri ĉi).

Vida Zavadskite — str. Taribu 13, Joniškelis, reg. Pasvalis (18-jara — kun ĉi pri filmoj, muziko, revuoj, bk, pm, insignoj).

Denisov M. — Murman, obl., 184 280 *Mončegorsk*, Leningr. nab. 24—83 (32-jara inĝeniero — pri numizmatiko kaj kaktaj).

Bronius Kairis — *Palanga*, K. Poželos 409—10, Litovio (kun esperantistoj el Sofio, Praho, Berlino, intersanĝas bk, pm k. a.).

Sigitas Baranauskas — *Klaipėda*, M. Gorkij 23-3, Litovio (kun 9-klasaj lernantoj, intersanĝas fotojn de kinoaktoroj, insignojn, pm.).

Bronius Riška — 235 653 *Šateikiai*, Plunges raj., Litovio (instruisto — kun ĉi pri ĉi, intersanĝas ekslibrisojn).

Mekys A. — 232 000 *Vilnius*, A. D. 149, Litovio (55-jara oficisto — kun ĉi pri la temo „Kiel faŝistoj kaj burokratoj persekutis Esperanton“).

A. Laurinavičius — 234 900 *Saldutiškis*, Utenos raj., Litovio (16-jara lernanto — kun ĉi pri muziko, aktoroj, estradaj kantoj pri Esperanto kaj).

Nyt. Maciulevičius — 234 900 *Saldutiškis*, Utenos raj., Vid. m-la X kl (16-jara lernanto — pri muziko, sporto, pm, bk).